REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 2 (15) aprilo 2003*




en la numero

jubileo de Andrej Grigorjevskij
EoLA-15, Strelka-5 kaj estontaj aranĝoj
rakonto de Mikaelo Bronŝtejn pri lia francia turneo
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
"Interesiĝo pri la morgaŭa tago" de Grigorij Arosev
la diskuto pri "abortaj" rimoj
"Cerbe kaj Kore", dediĉita al virinoj
novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2003

La 10-a de majo 1963

En Kapustin Jar (Astraĥana regiono) ĵusnaskiĝinta knabeto estis facile identigita kiel Andrej Ananjin.



1988

La 10-a de majo 1973

En Volgograd lernejano Andrej Ananjin, aktive festinte la Tagon de internacia laborula solidareco, la Tagon de la Venko kaj la propran dekjariĝon, komencas iom post iom reveni al la kutima vivo. Iomete embarasita li konstatas, ke simila festozeco ripetiĝos ĉiam, kvankam li dume ne scias ke siatempe festoj estos eĉ pli multnombraj.



1991

La 10-a de majo 1983

En agrablega printempa Volgograd studento de la filologia fakultato de loka universitato Andrej Ananjin, okaziginte vican E-renkontiĝon, hazarde rememoras, ke ĵus pasis du ŝtataj festoj kaj venas lia 20-jariĝo. Post plia tago venos la konscio, ke ankaŭ la studsesio nemalantaŭmontas. La kanto "Idealo" dume ne estas verkita.

La 10-a de majo 1993

Troviĝanta meze de Rusio kaj Nederlando, post kelkaj monatoj eksiĝonta estrarano de TEJO, la unua en la historio estrarano el Rusio, Andrej Ananjin, tute forgesinte pri la malaktualiĝinta Tago de internacia laborula solidareco kaj la ĉiam aktuala Tago de la Venko, serioze ekcerbumas, ke ja post nur du jaroj necesas organizi la unuan en la historio IJK-on en Rusio. Apude situantaj konatoj kaj amikoj aludas, ke ja venas lia 30-jariĝo! Andrej akceptas tion kun indiferenta scivolemo – срабатывает годами вырабатываемая привычка. La kanto "Idealo" jam estas verkita kaj duone (por ĉiam) forgesita.



1995

La 10-a de majo 2003

En Ŝumerlja (Ĉuvaŝio) eksiĝonta post 15 monatoj estrarano de UEA, la unua en la historio estrarano el Rusio, Andrej Grigorjevskij, festinte la Feston de Printempo kaj Laboro, la Tagon de la Venko kaj la unujariĝon de sia filo Aleksandr, komprenas du aferojn: 1) organizi UK-on en Rusio dume ne eblas; 2) venas lia 40-jariĝo. Li sentas sin multe pli juna kaj energiplena ol antaŭe.

Tutsincere lin gratulas okaze de la paradoksa cifero kaj elkore deziras ĉion plej bonan (sanon al li kaj al la familio, feliĉon, realiĝon de la planoj, novajn ideojn, bonan veteron, rapidan modemkonekton, amason da elspezeblaj financaj rimedoj) en la mondo -



2002

Lengroj (Lena kaj Griĥa); Aleksej Guljajev; Andrej Alaskin; Garik; Alla Jaĥina; Mikaelo Ĉertilov; Jurij Karcev; Viktor Aroloviĉ; Valentin Melnikov; Irina Mironova; Miĥail Povorin; Mikaelo Bronŝtejn; Valerij Ĉerepanov; Jefimov akk Biero; Aleksandr Ĥrustaljov; Kalle Kniivilä; Slavik kaj Puŝtunka; la familio Martins-Tuvalkin: Irina, Marta kaj Antonio; Onjo; la familio Akimovi: Etulinka, Jevgen kaj Ĵeneĉka; Erinaco; Vitalik Malenko; Aleksandro Koval; Vladimir Samodaj; Ljoŝa Kuznecov kaj kostromanoj; Mikola Ramanoŭski; Konstantin Viĥrov; Nikolao Gudskov...

... kaj tre-tre multaj aliaj, kiuj simple ne sukcesis ĝustatempe aliĝi al la gratuloj!!!

ĈION BONAN AL VI, ANDREJ!

EoLA-15

Inter la 5-a kaj 9-a de marto en Novosibirsk pasis la festivalo EoLA-15, kiu unuafoje okazis en Siberio. En la festivalo partoprenis 53 artemuloj el 8 urboj (Irkutsk, Krasnojarsk, Moskvo, Novokuzneck, Novosibirsk, Sankt-Peterburg, Tomsk, Tjumenj). La festivalo pasis vigle kaj interese, ĉar ĉiuj urbaj grupoj preparis diversajn kontribuojn por la konkursa kaj koncerta partoj de la aranĝo. Estis fakte unika renkontiĝo, en kiu ĉiu veninto partoprenis en iu (eĉ plej ofte en iuj) prezento(j). Aparte menciindas la ensemblo de Sergej Bozin el Krasnojarsk, kiu prezentis tri diversajn koncertojn; kelkaj muzikistoj el tiu grupo krom partopreno en la ensemblo mem verkas kaj plenumas siajn kantojn. Du el ili fariĝis laŭreatoj de la kanta konkurso. Impresis ĉiujn profesie farita pantomima prezento de Konstantin Malasaev el Tomsk. Al festivalo venis ankaŭ kelkaj delongaj siberiaj esperantistoj, kiuj ne aperas en la aranĝoj en okcidenta parto de la lando. Alia impresa parto de la konkursa programo estis kvin teatraĵetoj, preparitaj de la kluboj el diversaj urboj. La mastroj preparis (krom ĉio cetera) ornamojn por ses ĉambroj, dediĉitaj al diversaj lingvoj kaj landoj (la germana, angla, japana, franca, hispana, rusa ĉambroj); dum la festivalaj tagoj okazis prezentoj de tiuj ĉambroj kun rakontoj pri koncerna lingvo kaj lando. Ne mankis ankaŭ ekskurso, metiejoj, libroservo, bufedo, diskoteko, komunaj kantoj, ludoj, teumadoj kaj babiladoj. Dum la festivalo pri ĝi dufoje raportis novosibirskaj televidkanaloj, kies ĵurnalistoj vizitis la aranĝon. Sube vi povas vidi la liston de laŭreatoj de EoLA-15.



la novosibirskaj organizantoj

Garik Kokolija (Moskvo)

Kanta konkurso

1. Konstantin Ĥlizov (Krasnojarsk)
2. Eljvira Nizamijeva, Anĵela Belenko, Marija Belenko (Novosibirsk)
3. Nina Turko (Krasnojarsk)


Maŝa Belenko

Teatra konkurso

1. Vinni-la-Pu (Novosibirsk)
2. Malgranda marvirineto (Novosibirsk)
3. Ŝi (Krasnojarsk)

La plej bona virina rolo

Marija Belenko, Jelizaveta Korŝukova (Novosibirsk) – la roloj en "Malgranda marvirineto"


Liza Korŝukova

La plej bona vira rolo

Alla Jaĥina (Krasnojarsk) – la rolo en "Ŝi"

Ajna distro

Novokuznecka E-klubo


Literatura konkurso (deklamado)

Anastasija Jemeljanova (Novokuzneck)

EoLetA (premio por infana arto)

1. Oksana Baskova, Marija Moskvina, Svetlana Ŝajdulina, Zuljfija Ŝajdulina (Novosibirsk) – pro originala plenumo de la kanto "Karteta dometo"

2. Ljuba Pasečnikova (Tomsk) – pro deklamado de versaĵo



familio de Pasečnikov

Kaj vi povas legi ankaŭ la mallongajn festivalajn impresojn de la ĉeforganizantino kaj kelkaj ŝiaj junaj lernantinoj.

Katerina Arbekova: EoLA-15 pasis… Laŭ mi, 4 tagoj estas ege mallonga periodo por tiu ĉi aranĝo. Mi, kiel organizanto, sentas tion pli akre, ĉar tiu tempo, dum kiu ni preparis ĉion, estis ege pli longa. Min ĝojigis homoj, kiuj venis al EoLA, ankoraŭ neniam mi vidis tiom da aktivaj partoprenantoj dum festivaloj. Tio signifas ke en Siberio vere loĝas kreemaj homoj, malgraŭ relative malgranda kvanto de partoprenintoj (nur 53!) – ĉiu, vere ĉiu, kontribuis al la programo. Mi esperas, ke ni faris ĉion por ke etoso de la aranĝo estu kreiva kaj varma. Mi lacis, ege lacis, sed nun mi havas multajn amikojn, siberianojn, kiujn mi neniam kontaktis dum E-aranĝoj en okcidenta parto de Rusio. Mi ĝojas ke EoLA okazis en nia regiono, nun ni ne sentas nin iu aparta popolo en Esperanta mondo. Kaj mi dankas ĉiujn, kiujn venis al nia festivalo kaj faris ĝin gaja, varma kaj interesa.



okuloj de la organizantinoj rondiĝis pro streĉa laboro

Sveta Ŝajdulina: Mi ŝatis la koncertojn de "Sakura" kaj ĉiujn, ĉiujn esperantistojn!


Nataŝa Saĵina: Mi tre volas veturi al EoLA-16 por renkontiĝi kun ĉiuj esperantistoj de la du antaŭaj EoLA-j.

Anja Arbekova: Mi ŝatis organizadon de diversaj ĉambroj: japana, rusa, hispana, germana, angla, franca. Dum EoLA mi trovis multe da amikoj.

Ksenija Trofimceva: Pleje mi ŝatis partopreni en la teatraĵeto "Malgranda marvirineto" kaj spekti la programon de Kostik Malasaev. Kaj ankaŭ al mi plaĉis nia amuza kantado de "Jupi-ja" en la manĝejo.

Zulja Ŝajdulina: Mi ŝatis labori en la kafejo kaj… ĉion, ĉion, ĉion. Mi tre volas veturi al EoLA-16.

En sekva numero de REGo estos publikigita granda artikolo de Sergeo Bozin, en kiu li rakontas pri EoLA en Novosibirsk, pri aliaj partoprenitaj de li festivaloj, pri historio de sia ensemblo, rezonas pri ĝenerala stato de E-kulturo.



Dum la 28-31-a de marto en Niĵnij Novgorod (NN), en la mezlernejo 154 okazis la aranĝo "Strelka-5", en kiu partoprenis 88 personoj el 7 urboj kun averaĝa aĝo ĉ. 20 jaroj. Laŭ asertoj de la organizintoj ĝi estis la lasta Strelka. Sube vi trovos rakonton de la ĉeforganizantino pri tiu ĉi kaj antaŭaj "Strelka"-j kaj impresojn de unu el la partoprenintoj.

IMPRESOJ KAJ SENTOJ PRI "STRELKA-5"

La jubilea "Strelka" finiĝis. Mi sidas, pensante, pri kio mi devas skribi, pri kio mi volas rakonti, kio estis "Strelka" por ni kaj kio iĝis "Strelka-5". Verŝajne, mi komencu de la historio.

"Strelka" naskiĝis en 1999, kiam EoLA devis esti en Kievo, multekosta, malproksima, kaj preskaŭ neniu povis aŭ volis tien veturi. Kaj en januaro min vizitis Dina Kvasova kun rondaj timiĝintaj okuloj kaj diris: "Oni volas veni al ni dum la martaj ferioj". Mi dekomence ne komprenis, kiuj "oni", kien "al ni", por kiu celo. Sed Dina klarigis, ke "oni" signifis "esperantistoj" (pli konkrete moskvanoj, ivanovanoj kaj dimgradanoj), "al ni" – temis pri NN, kaj la celo estis renkontiĝi, ĉar la homoj jam alkutimiĝis ien veturi por la martaj ferioj, sed EoLA devis esti en Kievo, multekosta...

Nia klubo tiam ne funkciis, nur 2-3 knabinoj vizitis diversajn renkontiĝojn kaj ĉi tio estis tiom malatendita, ke ni... decidis ion fari. Ni estis kvarope – Dina, Lena Straĵnova, Oljga Alekseeva kaj mi. Dum la unua semajno de preparado ni trovis Larisa Jesenkova, kiu konsentis al ni helpi, kaj mi fiere konstatis, ke dum unu semajno niĵegoroda klubo kreskis je 25%.

En aŭgusto 2003 okazos du la plej popularaj someraj E-aranĝoj en nia lando – OkSEJT kaj RET. Pri OkSEJT-43 vi povas legi en la lasta kovrilpaĝo de tiu ĉi numero. La informleteron pri RET-03 vi ricevos kune kun tiu ĉi gazeto.

Miŝa Gindinson proponis la nomon por la niĵegoroda renkontiĝo, kaj – mi ĝis nun ne povas kompreni kiamaniere – ni faris la unuan "Strelka"-n. Nia pleja timo estis financoj, sed Dina evidentiĝis tiom bona financistino, ke ni post "Strelka" eĉ restis kun profito. Ĝi estis 186 rubloj, kiujn ni sukcese fordrinkis. Dum tiu gaja drinkado ni trovis, ke al ni ege plaĉis tion fari (ambaŭ: drinki kaj "Strelka"), kaj – ĉu ne historia momento? – ni decidis daŭrigi.

Post tio nia klubo ekfunkciis, al ni venis novaj homoj, ni okupis ejon en radiofakultato de la universitato. Tie ni sukcese "loĝis" dum 4 jaroj kaj kunvenas nun ĉiuĵaŭde je la 19.00.

Tempo flugis, la dua "Strelka" havis grandan sukceson, kaj oni nin invitis al junulara TV-programo por prezenti Esperanton kaj la 3-an "Strelka"-n. Mi diris tie multon pri nia lingvo kaj kulturo (la intervjuo daŭris 20 minutojn) kaj poste prezentis "Strelka"-n. Mi diris jen kion: ""Strelka-3" okazos tie kaj tiam, tien venos la plej famaj esperantistoj el multaj rusiaj urboj, kaj ĝi daŭros "non-stop" dum tri tagoj". Tiun programon mia edzo spektis en kompanio de siaj amikoj, kiuj, laŭ liaj vortoj, preskaŭ falis senvive. "Ha, – diris ili, – nun ni scias, kiu organizaĵo estas la plej "kruta" en Rusio: esperantistoj. Ili el televidilo informas: "Strelka"-n ni havas! "Aŭtoritatoj" el la tuta Rusio venos, kaj tiu ĉi "gop-stop" daŭros dum plenaj 3 tagoj."

Post la tria "Strelka" ni komprenis, kiel facile estas organizi E-aranĝojn, kaj iu, eble eĉ mi, demandis: kial do ne gastigi OkSEJT-on? Sed ĉi tio devas esti alia rakonto.

Post OkSEJT neniu en la klubo ial deziris almenaŭ ion fari. Preskaŭ ĝis marto mi estis certa, ke "Strelka-5" ne okazos. Kiam mi demandis Lena-n, ŝi respondis, ke "... mi ne iĝis maljuna, sed mi ne plu prizorgos bufedejon". Ankaŭ Dina diris sendube: "... certe mi ne iĝis maljuna, sed mi ne plu prizorgos financojn". Mi kun mi mem kutime ne parolas, sed kiam

mi provis demandi mian internan voĉon, mi aŭdis preskaŭ la samon: "... mi certe estas ege pli juna ol ili, sed...". Sed dum tia longa periodo en nia klubo aperis novaj homoj. Kaj Diana Sakajeva, kiu de septembro volis renkonti esperantistojn en NN, diris: "... eble mi prizorgos la bufedejon". Kaj Lena Kostina diris: "mi mem invitis aliurbanojn kaj mi kun plezuro al ŝi helpos". Kaj Polina Vasilejko rigardis min de ĉiuj 150 centimetroj de sia staturo kaj anoncis: "Mi VOLAS prizorgi la financojn!" Mi eĉ post tio dubis: 16 jaroj – kiuj financoj, kiu bufedo! Sed, "kiam la partio diras, komsomolo ĉiam respondas – jes". Kaj ni pretigis la programon de "Strelka-5" dum 2 semajnoj. Karaj, kiel facile estas fari ion, kiam oni faras tion la kvinan fojon! Kaj iu, eble eĉ mi, demandis – kial do ne gastigi...?

… ne, nun mi estas saĝa – ĉi tio estos absolute alia rakonto.

Nun la jubilea "Strelka" finiĝis. Mi sidas, pensante, pri kio mi devas skribi, pri kio mi volas rakonti, kio estis "Strelka" por ni kaj kio iĝis "Strelka-5". Verŝajne, mi daŭrigu per la statistiko.

Dum ĉi jaroj "Strelka" iĝis por 118 homoj la unua Esperanto-renkontiĝo. 58 esperantistoj vizitis NN unuafoje, veninte al "Strelka". Ĉiujn "Strelka"-jn vizitis 7 homoj, inter ili estas unu aliurbano – Sergej Zatulov. En ĉiu "Strelka" partoprenis moskvanoj, dimitrovgradanoj kaj ivanovanoj. La geografio de "Strelka" inkludas ankaŭ Jaroslavlj, Uljanovsk, Ĉeboksari, Novoĉeboksarsk, Kazanj, Kineŝma, Koĥma, Kovrov, Kostroma, Tverj, NN kaj regiono: Dzerĵinsk, Bor, Kstovo, Selekcija. La plej junaj "Strelka"-anoj preskaŭ neniam estis pli aĝaj ol 2 jaroj: 1 – ĴenEĉka Akimov (1 jaro kaj 9 monatoj), 2 – Tjomka Gindinson (10 monatoj), 3 – Jan Golubencev (3 monatoj), 5 – Belka Kozlova (1 jaro kaj 7 monatoj).

Pri "Strelka" ĉiam multe skribis amaskomunikiloj; ĉi-jare oni nin eĉ ne demandis pri datoj aŭ situo de "Strelka" kaj mi nur postfakte eksciis, ke unu gazeto publikigis anoncon de "Strelka" kaj, malgraŭ ke ni neniun invitis, 3 ĵurnalistoj venis al nia renkontiĝo.

Inter la plej sukcesaj programeroj de "Strelka" estis preskaŭ ĉio, kion ni proponis: manlabora bloko: dekorado de boteloj, vestaĵo por fenestroj (Jana Kozlova); danca bloko: rokenrolo (Ljoŝa Kozlov), valso (ge-Zatulov-oj), strangaj dancoj, diskoteko; teatra bloko: "Du pudeloj" fare de la teatra studio "Listopad", "Arbo" fare de la teatra studio de pantomimo kaj plastiko "Diĥanije" + komuna koncerto; trejnada bloko: "Misio", "Trejnado de aktora majstreco" (Irina Kuĉina); sporta bloko: "uŝu" (Oleg Makarov), jogo (Natalja Smirnova), korbopilko; muzika bloko: "Muziko de la 20-a jarcento", "Ĵazo – de kaj ĝis" (Polina Vasilejko); ekskursa bloko: "Mizerkvartaloj de NN" (Aleksej Zapalov).

Ĉi-jare "Strelka" havis sponsoron. Kio min iomete ŝokis: kiam mi petis la donacojn por tiuj, kiuj laboris dum tiuj ĉi jaroj, li – la sponsoro – ne diris "jes" aŭ "ne", sed demandis "kiom?" kaj poste surpriziĝis: "kial tiom malmulte?". Kaj li mem proponis alian sumon. Verŝajne ni meritis... Nia klubo dankas ĉiujn, kiuj iam helpis al ni fari "Strelka"-jn aŭ partoprenis en ili.

Do. "Strelka" la kvina, jubilea, la lasta – sukcesis. Ĝi estis sendorma (mi havis nur 4 horojn da dormado dum 3 tagnoktoj), freneza, printempa, bonetosa, romantika, gaja kaj iomete trista. Kion fari – ĉio bona iam finiĝas. Por ke povu komenciĝi io nova.

Jelena Akimova (Etulinka)

ĈU LASTA "STRELKA"?

Plaĉas al mi "Strelka". Ĝenerale. Kaj plene. Ankaŭ la homoj, kiujn mi povas renkonti nur tie. Ĝia malrapida, preskaŭ pigra fluo. Ĝiaj psikologiaj trejnadoj kaj strangaj dancoj. Ĉinaj batalartoj-gimnastikoj kaj jogoj. Teatraj prezentadoj kaj majstro-klasoj. Kantadoj laŭrondaj kaj prelegoj priĵazaj. Manĝejaj babiladoj kaj rondaj tabloj. Intelektaj kaj moviĝaj ludoj. Laciĝis mi tie pro sendormo. Ĉar mankas la tempo por dormi. Troviĝas multe da aliaj, pli in-

teresaj, aferoj. Tamen laciĝo pasas, sed la impresoj kaj la spertoj restas.

Kaj jen kion originalan ĉi-jare elpensis Etulinka, la animo de "Strelka"-j: disdonis po unu bildkarto de NN al ĉiu partoprenanto de "Strelka", petis skribi sur ili siajn adresojn, kaj poste doni la bildkarton al tiu homo, de kiu oni volas ĝin ricevi (jam kun iu teksto de tiu homo)! Brilege! Tiu ĉi – i.a. jubilea, kvina – "Strelka" por mi estas kvazaŭ tia granda bildkarto de la NN-a E-klubo "Ĉapelo", de tiuj homoj, kiujn mi ege-ege ŝatas kaj amas. Kiuj faris tiun ĉi "Strelka"-n por ni (kaj por si). Pro kio al ili nemezureblan dankon!

Kaj malgraŭ tio, ke oni nomas tiun "Strelka"-n la lasta, mi kredas, ke sekvajare ĝi denove okazos. Nu ne povas ne okazi!

Oĉjo Dadaev (Moskvo)

PRIMAVERO EN TOBOLSK

Dum pluraj jaroj en la Urala regiono ne okazis E-renkontiĝoj. La aktivado en urboj kaj kluboj estas pasiva, dum en la lando rimarkeblas diverskampa reviglîĝo en la esperantista medio. Antaŭ multaj jaroj estis bonega ekzemplo: REVU – Renkontiĝoj de Esperantistoj de Volgio kaj Uralo. Ilin aktive partoprenis entuziasmuloj el grandega areo de Perma, Sverdlovska, Tjumena, Ĉeljabinska, Samara regionoj, Baŝkirio. Oni kutime renkontiĝis por du tagoj printempe kaj aŭtune kaj interese kaj utile pasigis la tempon. Pluraj el tiamaj aktivuloj estas ankaŭ nun en tre aktiva formo.

Ni proponas kunordigi kaj revigligi la iaman regionan agadon, fari ĝin interesa kaj loga kiel por spertuloj, tiel por novaj esperantistoj. La brila sukceso de la pasintjara RET-02 (Rusiaj E-Tagoj) apud Kovrov donas kuraĝigan ekzemplon. Tial ni invitas ĉiujn adeptojn kaj amikojn de Esperanto partopreni en la nova regiona renkontiĝo por ĉiuj aĝoj, kiu okazos en Tobolsk dum 01-02-a de majo 2003. La renkontiĝo estas destinita por ĉiuj, kiuj volas pasigi du interesajn tagojn en amika E-rondo en la iama ĉefurbo de Siberio, antikva belega urbo, fondita en 1587. Ĝi havos la temon "Regiona agado: direktoj kaj perspektivoj".

> La 15-16-an de marto en Uljanovsk sub patroneco de la urba administrejo okazis granda intelektluda turniro, kiun partoprenis ankaŭ la teamo "Esperanto" gvidata de Jurij Karcev. Laŭ rezultoj de la turniro ĝi okupis lokon meze de la ranglisto (pli ol 50 teamoj el diversaj urboj de Rusio kaj proksima eksterlando) – laŭdinde por debutantoj!

En la programo: Konferenco pri la ĉefa temo (gvidas la estrarano de REU pri la regiona agado Viktor Kudrjavcev); Prezento de la nuna stato de E-movado en Rusio: 22-a Rusia Esperantista Kongreso, 19-a REU-konferenco, decembro 2002, atingoj kaj perspektivoj; Panoramo de rusiaj Esperanto-gazetoj kaj rusiaj gazetoj pri Esperanto; Klubo de legantoj: renkontiĝo kun la redaktoroj de la revuo "Komencanto"; Panoramo de esperantistaj rendevuoj (Rememoroj pri OrSEJT-24, Tjumeno 1982; OrSEJT-33, Tjumeno 2001; aliaj E-renkontiĝoj); Ekspozicio de esperantaĵoj (bonvolu veni kun albumoj, fotoj, klubaj murgazetoj, gazetartikoloj, revuoj, afiŝoj, sonkasedoj, KD-oj, aliaj eksponindaj esperantaĵoj); Librosservo; Didaktika programo por novaj esperantistoj (Dilara Gadirova, Vladimir Opletajev); Amika vespero kaj koncerto (konkursoj, skeĉoj, lingvaj kaj societaj ludoj fare de ĉiuj partorpenontoj); Ekskurso tra la historia centro de Tobolsk kun vizito de Kremlo, muzeo de decembristoj, lokoj ligitaj kun la lasta rusia caro, katedraloj kaj aliaj vidindaĵoj; Vizito al Tobolska teatro (Dilara Gadirova).

Agrabla surprizo! Venos Anatolij Radajev el Samara, konata aŭtoro, gitaristo kaj kantisto, kun kies akompano ni ĉiuj povos rememori kaj kanti niajn komunajn kantojn!

La kondiĉoj: loĝado en turista stacio kun minimuma komforto (malvarma akvo), en tre varma amika atmosfero kaj modera prezo – nur 60 rubloj por tagnokto (dezirantoj povos antaŭmendi hotelon); aliĝkotizo (pagenda surloke) – 70 rubloj; manĝado – matenmanĝojn

kaj vespermanĝojn preparas la partoprenantoj mem en la turista stacio, tagmanĝo laŭ deziro kaj interkonsento kostas 20 rublojn.

Dezirantoj partopreni en la aranĝo kontaktu la organizantojn: Dilara Gadirova (Tobolsk, tel. (34511) 64484; rete <dilaratobolsk@yandex.ru>); Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg, <komencanto@r66.ru>); Vladimir Opletajev (Surgut, <nordovlop@mail.ru>).

Bonvenon al Tobolsk!

HIERAŭ-1

La 01-04-an de majo en la antikva Rusia urbeto Suzdalj okazos HIERAŭ-1 (HIstoria Esperantista Renkontiĝo Aŭtentika; alia varianto – HIstoria Esperantista Renkontiĝo Aŭ… Aŭ kio? Pensu mem!). Ĝi havas temon "Kanto de Kantoj", ĉar partoprenontoj ekscios, kiel oni AMIS dum diversaj periodoj de homarhistorio, – en Antikvaj tempoj, Mezepoko, Renesanco, dum Galanta Jarcento kaj Epoko de Romantismo. Nur dum HIERAŭ vi povos amindumi laŭ epoka etiketo… kaj multon alian! Partoprenkotizo –100 rub., loĝado – ĉ. 70 rub. por unu tagnokto. Kontaktu la organizantojn: <iv_teamo@mail.ru>, <sony@mail.icomtex.ru>.

Sonjo Ŝejnina (Ivanovo)

ANKORAŬ DU ARANĜOJ EN UKRAINIO

Ĉi-jare ĉiuj esperantistoj denove estas invitataj partopreni en la Renkontiĝo de Esperantista Junularo (REJo-2), organizata de Societo por subteno kaj defendo de ukraina kulturo "ESPERO", E-klubo KARE kaj junulara societo KEJS. La aranĝo okazos dum 30.06-06.07.2003 apud Kievo, en la sama loko kiel pasintjare. Akceptataj estas ĉiuj, kiuj konsideras sin juna, sendepende de la lingvonivelo – eĉ nulaj komencantoj (pri ili zorgos spertaj instruistoj). Kie ankoraŭ povas homoj tiel bone infektiĝi per "verda viruso", se ne en E-renkontiĝo?

La partoprenkotizo varias depende de la aĝo de 140 ĝis 190 ukrainiaj hrivnoj por amasejo, kaj de 220 ĝis 275 hrivnoj por loĝado en 2-3-litaj ĉambroj. La kotizo inkluzivas aliĝon, manĝojn, loĝon kaj la programon. Nuna kurzo estas ĉ. 6 rubloj por unu hrivno.

Por la programo estas atendata la fama "Studio P" – teatra trupo el Pollando (partoprenintoj de IJK-51 verŝajne memoras ĝin), spektaklo "Vi, mi kaj... pupisto" far Kieva pupteatro, modernigita unika E-kurso de V.Soroka "Septima" kaj koncerto de lia ensemblo kaj aliaj interesaj programeroj. Estus ege bone, se iuj el vi venus al nia renkontiĝo prepariĝinte laŭ la temo "Esperanto – kulturperanto". Ĉu Rusio ne havas kion montri?

Estas unika sistemo de rabatoj: vi povas partopreni en la renkontiĝo TUTE SENPAGE! Jen estas la preskribo: korespondu, amikiĝu, invitu partopreni en REJo la malnovajn kaj novajn amikojn! Por ĉiu Via amiko, veninta el Okcidenta Eŭropo Vi ricevos rabaton – 25%, sed por 3 – senpage! Por ĉiu Via amiko, veninta el Mezeŭropo Vi ricevos rabaton-20%, sed por 4 – senpage! Kun superaktivuloj ni pretas trakti kompenson de la vojelspezoj. AKTIVI ESTAS PROFITE, ĈU NE?

Kontakteblecoj: Mikaelo Lineckij, p/k 91, UA-04201 Kievo-201, Ukrainio; tel. (380-44) 4320743; rete <rejo@ukr.net>.

Krome, antaŭ aŭ tuj post (estas tri periodoj) REJo-2 ĉiu deziranto estas invitata al Poltavio por partopreni en somera infan-familia Esperanta tendaro "Arĝentaj poploj", organizata de Internacia Junulara Krea Unuiĝo GAUDEAMUS (partoprenintoj en REJo ĝuos 25%-an rabaton en "Arĝentaj poploj"); kontaktadreso <pigoj@yahoo.co.uk>.

Pliajn informojn pri ambaŭ renkontiĝoj vi povas vidi en <www.espero.kiev.ua> (la rubriko "Aranĝoj"). NI LABORAS POR VI!

Prof. Mahomet Isaev

DE VILAĜO AL ĈEFURBO

(daŭrigo, vd la komencon en REGo 1(14), 2003)



Por interlingvistika laboro gravis ekzisto de la Problema grupo pri interlingvistiko en nia Instituto de lingvoscienco. La fondinto kaj motoro de la grupo estis Eŭgeno Bokarjov. Sed ankaŭ aliaj bonaj interlingvistoj multe kontribuis. Mi nomu Sergeon Kuznecov. Ne tuj mi lin akceptis kiel veran helpanton – li komence rilatis al Esperanto kiel al nur unu el pluraj lingvoprojektoj. Min tio indignigis, ĉar Esperanto estas ne unu el projektoj, eĉ ne Ido, sed vere plenvalora lingvo. Sed post multaj akraj diskutoj, sub influo de nia kolektivo Kuznecov fariĝis vera interlingvisto-esperantisto kaj faris multon interesan.

Mi sukcesis verki kaj eldoni kelkajn librojn pri Esperanto. En la akademia Instituto de orientologio oni lanĉis la libroserion "Lingvoj de la mondo". Kun helpo de Nikolaj Borisoviĉ Zubkov – ĉarma homo kaj bonega esperantisto, kiun mi adoras – ni sukcesis trabati tie la lokon ankaŭ por Esperanto. Sed, kiel oni diras, iniciato estas punenda. Kaj oni al mi diris: se vi volas, do verku mem. Kaj al mi tio estis necesa, ĉar mi al la lingvo venas de la scienco. Tio estas unu vojo, la alia vojo estas de la praktiko. Veni de la praktiko estas, certe, granda plezuro. Mi en la kurso de la praktiko venis. Sed al mi estis interese sekvi la lingvistikan sistemon de Esperanto. Kaj mi kun granda inspiro verkis la libreton, kaj kun konscio, ke mi faras por Esperanto kaj interlingvistiko utilan servon. Tiel aperis la libro.

Kaj koncerne la lernolibron, kies kunaŭtoro mi fariĝis, estis alia historio. Komence mi simple konsiladis al Zinaida Semjonova, kiu kolektis materialojn. Estis kelkaj variantoj. Ni entuziasmiĝis, ĉiam pli profundiĝis, kaj foje ŝi al mi diris: "Mahomet Izmajloviĉ, estu ĝi via lernolibro. Vi tiom multe faras". Mi diris: "Neniukaze!". Kaj ni longe diskutis, kies libro ĝi estas, ĉu ŝia, ĉu mia, kaj fine decidis: estu ĝi komuna. Tamen mi opinias, ke de ŝia flanko estis kontribuita tiom granda laboro kaj sperto, kaj de la mia – nur aranĝo kaj korekto de kelkaj tekstoj (ĉar mi pli bone komprenis, kion eblis presi en tiamaj cirkonstancoj), ke ŝi, kiel la aŭtoro, multe pli gravis. Kiel ajn, la libro aperis, kaj mi ĝojas, ke ĝi iun utilon alportis.

Poste mi dudirekte okupiĝis pri Esperanto: de pure scienca vidpunkto, ĉar min, kiel lingviston, tio tre interesis; kaj de la alia vidpunkto – kiel filozofo – ja la lingvo, kiel evidentiĝas, povas esti farita surbaze de aliaj lingvoj. Kaj Esperanto aspektas plej perfekta, kvankam mi vidis dekojn da aliaj novaj projektoj. Mi opinias, ke tiuj dek jaroj, kiam mi estis prezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, estis la plej fruktodonaj kaj por mia animo, kaj por mia ekzisto kiel lingvosciencisto.

Apartan intereson elvokas, mi opinias, tio, kiel aperis la Asocio. Por historio mi volas nepre pri tio rakonti. Okazis, ke oni foje vokis min al la scienca fako de CK de KPSU – tien oni nur vokadis, ne invitadis – kaj proponis verki mallongan raporton por la fako. Ĉar, kiel mi poste eksciis, ĉiuj fakoj funkciis laŭ mendoj de Andropov, kiu tiam estris la Komitaton pri Ŝtata Sekureco. Ne tre ofte en mia vivo, sed okazis, ke antaŭ mi aperadis la demando: ĉu mi ion prezentas kiel vera homo, kaj tiam mi diru la veron, aŭ mi estas nenio kiel homo, kaj hipokritu. Mi sciis, ke mi riskis, sed decidis diri la veron. Mi skribis, kion mi pensis – de la moderna vidpunkto, verŝajne, ne multe, tamen… Mi skribis: "Kiu bezonas, ke centoj, aŭ eĉ miloj da junaj homoj, tre scivolaj, aktivaj, sentu sin disidentoj, kial, anstataŭ subteni ilin, rilati al ili kiel al disidentoj? Kiu bezonas tion anstataŭ uzi tian rimedon, kia estas Esperanto,

anstataŭ uzi ĝin internaciskale?” Ktp. Mi donis tiun raporton en la fakon. Tie laboris iu Ivanov, tre ĉarma homo, sed ja li estis en CK, kaj faris sian aferon… Kaj li diris: “Iom tro krude, sed ni rigardu…” Mi ion refaris, plifortigis la sciencan aspekton, kaj la tro indignan intonacion forigis.

Pasis, ŝajne, 4 monatoj, aŭ eĉ duonjaro. Vokis min Ivanov. Kaj, min mirigis, ke li ekstaris, prenis min je la brako, demandis, kiel mi fartis, proponis kafon. Mi ekmaltrankvilis – kion tio povas signifi? Kaj subite li diris: “Ni gajnis! (Nu, rimarkindas tiu “ni”!) Nia raporto trafis al la plej-pleja. Kaj Andropov pozitive rilatis. Jen kio estas decidita”. Kaj li donis al mi decidon de la Sekretariaro de CK sur unu paĝo. Mi rigardis du-tri foje, sed jam nenion vidis, en tia stato estis. Sed mi komprenis, ke ĝi estas pozitiva decido. Mi trovis miajn proprajn frazojn: “Anstataŭ ol helpi al la junularo, oni ĝin tenas en tia stato ke faras el ĝi artefaritajn disidentojn”, ktp., kaj fine – la decidon: “Unue – krei Asocion de sovetiaj esperantistoj, due – organizi la konferencon, trie – prepari la gvidantaron”. Mi demandis: “Ĉu licas reskribi?” Li respondis: “Reskribi ne licas, vi povas tion ĉi nur ekmemori”.

Mi foriris, longe iris piede, necesis ĉion digesti, kun iu pridiskuti, sed al mi estis dirite: “Dume silentu. Vi ĉion legis, kion skribis ni kun via helpo”. Ja vere, tie estis skribite: la decido laŭ la raporto de Scienca fako de CK (nu, vere – ja ne Isaev tion skribis!) – sed ni ambaŭ sciis, kion tio signifas. Post kelka tempo oni min invitis kaj diris: ni pridiskutis. Mi tiam estis ankoraŭ sufiĉe juna homo. Ili diris: “En Akademio de la sciencoj ni konsultiĝis, kaj tie oni proponis ke vi estu prezidanto de la asocio”. Mi diris: “Neniukaze! Ni havas tiom da elstaraj esperantistoj! Kaj mi estas nur apud Esperanto. Mi Esperanton amas, sed mi havas la ĉefajn okupojn, ktp”. Mi proponis kaj Armandon, kaj Danovskij-on… “Bone, pensu”. Kaj post semajno oni al mi telefonis: “Ni proponos vin”.

Jen tiel oni min elektis. Kaj mi ĝis nun ĝojas pro komunikado kun la plej bonaj esperantistoj, kaj kun esperantistoj ĝenerale, ĉar tio estas la popolo, la agantoj, kiuj amas sian aferon kaj faras por la afero ĉion – kaj la materian, kaj la spiritan. Hodiaŭ miaj vortoj ne sonas, ĉar hodiaŭ ĉiu volas tuj ricevi por sia laboro ion. Tiam estis pli facile, sed ankaŭ… Ne plu estas tiaj homoj, kiel David Lvoviĉ Armand, Semjon Podkaminer, Nikolaj Danovskij – la plejado de la plej belaj homoj. Mi estas edukita en la spirito de la socialismaj ideoj, kaj opinias, ke la komunisma socio, kiu estos iam, diferencos de la nuna nur per nobleco, pureco de interrilatoj, senpereco. Ĉion tion mi vidis ĉe miaj kolegoj, kiuj ĉiam estis tiom ĝojaj, ke oficiala E-movado ekzistos! Al mi, laŭ la kaŭkaziaj kutimoj, estis ĝene, kiam Armand diris: “Kiam al vi veni, kiam al vi helpi ĉion fari?” Podkaminer el Leningrado alvenadis, aŭ ni al li veturis – nun tiaj aferoj ne okazas, bedaŭrinde.

Mi, eble, ne estis iu elstara esperantisto, aliaj personoj min superis. Sed kiam mi estis prezidanto de ASE, mi opiniis mia tasko ĉiam plifaciligi agadon de la aliaj, kiuj, laŭ mi, pli valoris ol mi – ebligi agadon de Danovskij, de Podkaminer, de aliaj… Oni ne scias, kaj bone ke ne scias, kiom multe kaj akre mi diskutis kun gvidantoj de SSOD, kaj multon sukcesis atingi. Certe, oni atendis pli, sed mi sukcesis persvadi tiujn gvidantojn pri tre multaj gravaj tiutempe aferoj. Bedaŭrinde, multajn aferojn ni simple ne povis atingi tiutempe.

Kio min profunde senrevigis, kial mi ne balotiĝis dum la lastaj elektoj en ASE, estis la konduto de junaj gvidantoj, ĉefe el Baltio kaj Transkaŭkazio. Ili pledis por E-movado en Litovio, Estonio, Kartvelio, Ukrainio, ankoraŭ ie… Mi tute aliaspekte vidas Esperanton. Esperanto estas fenomeno, kiu nin unuigas, ne disigas. Sed pluraj el ili pro tia “separatismo” en E-movado havis materialan subtenon de siaj rondetoj en siaj lokoj. Ekzemple, la litovoj al mi diris: “Se ni plu tiamaniere, en la tutsovetia skalo, laboros, nin neniu subtenos. Nin ne komprenos niaj gvidantoj”.

Kaj rezulte E-movado en plejparto de lokoj ege malfortiĝis – eble ĉie, krom Litovio kaj Ukrainio. Ni – Samodaj, mi – en la, tiel diri, “centro”, havis unu pensmanieron, kaj la alian

– homoj el diversaj lokoj. Nu, la litovoj ne malgajnis, ĉar havis fortegan organizaĵon, kaj povis funkcii kaj surloke, kaj en la centro, sed ĝenerale al esperantistoj okazis la samo, kiel al ĉiuj sovetianoj. Ni ne estis pretaj al tia falo. Se niaj gvidantoj (mi ne volus enmiksi politikon, sed sen politiko ne eblas), kiuj ekdeziris entombigi socialismon kaj transiri al la merkata socio, elektus la pogradan vojon, kiel, ekzemple, en Ĉinio, do falo okazus nek en la materiala rilato, nek en la spirita. Mi nenion kontraŭ la merkata socio havas, sed la vojo estis erara. Kaj nun estas la falo. Kaj mi pensas, ke al ni nun estas pli komplike integriĝi en la internacian movadon, ol kiam ni komencis restarigi tiujn kontaktojn. Tiam ni havis subtenon – SSOD nin sendadis eksterlanden. Nun oni vojaĝas ja, sed ne organizite, kaj ne nepre trafas al internaciaj renkontiĝoj la plej valoraj homoj. Kaj mi opinias, ke por ekssovetiaj respublikoj estus bezonata iu kunordiga centro por la plej ĝeneralaj E-demandoj – historio, teorio kaj praktiko de E-movado, por scii kio kie estas…

Certe, ĝenerala kunordigo pere de UEA estas bona afero, sed devas esti ankaŭ, por pli sukcesa laboro, iu subnivelo. Ja ni, en KSŜ kaj Baltio, havas plurajn komunajn problemojn, iuj kulturaj tradicioj estas komunaj, kaj antaŭ ol ni fariĝos veraj eŭropanoj, pasos historiaj epokoj. Kaj ni prepariĝu al tio kune. Kaj ankaŭ tiam – kaj des pli tiam – ni tutegale estos kune. Ni devas pensi, ekzemple, pri terminologio. Kiel fakulo-lingvisto mi pri tio pensas. Ekzemple, kion fari pri nomoj, toponimio ktp.? Antaŭe oni almenaŭ en krampoj nepre skribis, kiel prononci iun naciskribitan nomon, nun oni, laŭ miaj observoj, ne plu tion faras. Kiel enkonduki terminojn por novaj realaĵoj? Esperanto estas instrumento memakriĝanta, sed helpi al tio nepre necesas. Necesas komuna laboro por tio.

Kio tute ne koincidas kun Esperanto, estas naciismo. Homo, kiu manifestas naciismajn ideojn, por mi kiel esperantisto ne ekzistas. Ankaŭ en la lingvoscienco nun estas tiuj tendencoj. Ekzemple, disvastiĝas teorio, ke ĉiu lingvo estas aparta pensmaniero, kaj plena kompreno ne eblas. Sed la lingvo estas ne primara, sed sekundara, ĝi estas nur reflekto de tio, kio estas en la menso. Kaj la mensoj de la homoj estas la samaj, kaj ĉiu lingvo povas reflekti ĉiujn nuancojn, kion pruvas la ekzisto de Esperanto mem. Sed ni devas iom zorgi, iom kontroli evoluon de Esperanto por ke ĝi ĉiam pli akriĝu kiel esprimilo de la penso, kaj tion oni devas fari kune, havante komunan kunordigan centron, kiu nenion diktu, sed estu vere aŭtoritata kaj influu per la aŭtoritato.

Bedaŭrine, la nuna epoko ne laboras por Esperanto. Iam estis pli da ebloj, kiujn ni ne sukcesis uzi, por pli vasta enkonduko de nia lingvo. Min, ekzemple, foje petis pri renkontiĝo la fama kibernetikisto akademiano Aksel Berg. Mi venis al li. Li diris al mi: “Ĉu via Zamenhof estis dio?” “Pri kio temas?” “Ni donis al niaj kalkulmaŝinoj (tiam tiel nomiĝis komputiloj) la taskon krei novan facilan lingvon por la scienco. Sed ĉiam ni ricevas lingvon malpli bonan ol Esperanto”. Mi tiam diris: “Sed ĉu vi neniam donis al viaj maŝinoj taskon inventi Periodan tabelon? Ĉu eblus? Grandaj homoj, geniuloj, havas momentojn de revelacio, kiam ili trafas preskaŭ ĝuste la celpunkton. Zamenhof trafis la punkton. En la lingvo estas tio, kio necesas; en la lingvo ne estas tio, kio ne necesas”. Kaj li al mi diris: “Mi ne scias, kion pensas viaj sciencistoj, po kiom da lingvoj ili scias, se ial ili opinias, ke la lingvo de estonta komunismo estos la rusa. Ne havas tiurilate la rusa perspektivon”. Kaj ni interkonsentis, ke la lingvo de la scienco fariĝu Esperanto, kaj sciencaj publikaĵoj fariĝu dulingvaj – paralele en la nacia lingvo kaj Esperanto. Kaj li planis, ke Ĥruŝĉov faru tian dekreton, preparis la projekton. Sed ĝuste tiam Ĥruŝĉov estis demisiigita. Ja en tiuj problemoj rolo de la personeco estas tre grava, kaj lia dekreto pri nepra verko de sciencaj artikoloj paralele en la rusa kaj Esperanto povus principe ŝanĝi la situacion.

Kaj tiurilate tia “voluntarismo” povas esti pli utila ol “demokratio”. Jen, ekzemple, Lenin siatempe reformis per dekreto la ortografion. Kaj poste, ankaŭ nun, kiam bezono pri reformo de la ortografio estas ne malpli granda, oni komencas pridiskuti ĝin en la socio. Jen,

granda sciencisto Vinogradov preparis brilan reformon. Hazarde eksciis Aĝubej, kaj publikigis. Komenciĝis bruo, diversaj verkistoj ekprotestis pro diversaj kaŭzoj… Kaj neniaj reformoj okazis. Se projektojn de kosmoŝipoj oni prezentus por tutpopola pridiskuto, neniu kosmoŝipo iam startus. Ankaŭ la lingvoreformoj estas afero de fakuloj.

Mi feliĉas, ke mi sukcesis dum mia vivo multe kontakti kun brilaj esperantistoj. Unuavice temas pri Bokarjov. Kun li mi renkontiĝis tre ofte, ofte vizitis lin hejme. Kaj li ŝatis kun mi paroli, pridiskutis kun mi la vortaron… Eble li simple bezonis iun kunparolanton, ĉar vivis en la lastaj jaroj de sia vivo sola, sed por mi tiuj konversacioj tre gravis. Li estis granda persono, kaj mi opinias, ke por esperantistoj estas devo organizi Bokarjovajn prelegojn. Ankaŭ Podkaminer estis historia persono. Li min flamigis per sia pasia temperamento, kiun li enmetis plene en E-movadon. Li bone direktis nin ĉiujn, instruis kontakti gravulojn, de kiuj povis dependi sorto de Esperanto-movado, sen konfrontiĝo; tiel, ke ili al ĝi bone rilatu. Danovskij estis tre saĝa persono. Ni ofte kontaktis, ĉar loĝis apude. Li ofte estis ĉe mi hejme, kaj mi ĉiam regalis lin per tagmanĝoj, ĉar al mi ŝajnis, ke li estas eterne malsata – sed ĉiuokaze estis plezuro, kiam li venis. Li estis brila persono, kaj lia sorto por mi ne kompreneblas. Ĉar li ial ne sukcesis vere disvolvi ĉiujn siajn talentojn. Homo, fanatike sindona al Esperanto, pro tio li foje eĉ suferis. Alia grandulo estis Armand – fama geografo, atinginta multegon en sia fako, kiam temis pri Esperanto, ĉiam helpis. Kaj lia frua forpaso estis granda perdo por la movado. Tre ĉarma homo, de kiu, laŭ mi, necesas lerni la sindonecon, estas Nikolaj Zubkov. Ĉiam por Esperanto li ĉion faris, kion povis. Ĉiuj ili devas esti modelo por ĉiuj esperantistoj pri la vera esperantisma konduto – ĉion fordoni al Esperanto, ne peni nur ricevi ion de ĝi, sed fordoni.

la rememorojn registris N.Gudskov kaj A.Junusov, esperantigis N.Gudskov

---

Vigla, juna, ĵus-diplomita revizoro dungiĝis al la Imposta Departemento. Ekscitiĝinte, ĉar li komencas ĉasi potencajn krimulojn, li estis iom konsternita kiam lia unua tasko estis revizori rabenon. Inspektado de la kontoj kaj la impostaj registroj estis sufiĉe rekta afero, kaj la rabeno evidente estis ŝparema, do la junulo decidis amuzi sin embarasante la rabenon.

– Rabeno, – li komencis, – mi notis ke vi aĉetas multe da kandeloj.

– Jes, – respondis la rabeno.

– Nu, rabeno, kion vi faras pri la kandelaj restaĵoj? – li demandis.

– Bona demando, – la rabeno diris. – Fakte ni konservas ilin ĝis kiam ni havas sufiĉe da ili, tiam ni sendas ilin al la kandelisto. Kaj de tempo al tempo li sendas al ni senpagan skatolon da kandeloj.

– Hmm..., – respondis la revizoro, desapontita pro la praktika respondo al lia nekutima demando. Do, li pensis ke li daŭrigu per sia ofendema maniero.

– Rabeno, kio pri ĉiuj ĉi aĉetoj de maco? Kion vi faras pri la pecetoj de maco?

– Ho, jes, – la rabeno kviete respondis. – Fakte ni amasigas ĉiujn pecetojn de la macoj kaj sendas ilin al la fabrikisto, kaj de tempo al tempo li sendas al ni skatolon da macaj buloj.

– Ho, – diris la revizoro, forte pensante kiel maltrankviligi la rabenon. – Nu, rabeno, kion vi faras pri tiuj prepucioj, post la cirkumcidoj?

– Ho, ankaŭ tiukaze ni ne malŝparemas, – respondis la rabeno. – Ni konservas ĉiujn prepuciojn kaj sendas ilin al la Imposta Departemento.

– La Imposta Departamento? – nekredante demandis la revizoro.

– Ho, jes, – respondis la rabeno, – la Imposta Departamento, kaj proksimume ĉiujare ili sendas al ni etan kacon kiel vi.

(esperanto-anekdotoj)

Ĉi-suba rakonto pri la turneo estis verkita de Mikaelo Bronŝtejn por franca E-gazeto. Sed ni opinias, ke ĝi povas esti interesa ankaŭ por la rusia esperantistaro.



MI AMAS DOMON, KIE ONI AMAS MIN...

ANSTATAŬ PREFACO

Ekster mia volo, mirakle okazis, ke la tuta historio de mia dekjara turneado estis benita en Francio. Pli ol 40 jaroj de mia vivo pasis en la naskiĝlando, en Soveta Unio, kies oficistoj neniam permesis al mi iri Okcidenten. La invitleteroj, kiuj venadis al mia adreso pli-malpli ofte, restis neuzitaj, ĉar la petskriboj pri uzo de tiuj leteroj ricevis ordinare nekompreneblan respondon de la permesinstancoj sovetiaj: “Ni opinias vian vojaĝon al... necelkonforma”. Konsiderante, ke ĉiuokaze la celo, kiun mi indikis en la petskriboj estis “Vizito al amikoj”, mi ĉiam demandis min, kio povus pli konformi al la celo viziti amikojn ol vojaĝo?

Sed la jaro 1991 anoncis al mi subite, ke mi jam loĝas en tute alia lando, ĉar mi ricevis la permeson iri kun miaj edzino kaj filo al la franca ĝemelurbo Herouville Saint Clair. Laŭvoje vizitinta la Kulturan Festivalon en Parizo, mi prezentis tie kvar miajn kantojn. Estis mia unua kantado en Okcidento. Restis la rememoro pri tre varma akcepto de la kantoj. Poste “Franca Esperantisto” eĉ raportis, ke mi estas, verŝajne, filo de Trockij. La aserto estis tre flata, sed, bedaŭrinde, malvera. Venis ankaŭ la propono ekvojaĝi tuj al kelkaj grupoj. Sed, certe, tiutempe mi ne povis lasi mian familion por longa kaj ne senproblema revena vojo hejmen, do, ni prokrastis ĉi-teman parolon ĝis poste.

Tiu “poste” venis en 1993, kiam per klopodoj kaj zorgoj de Claude Nourmont-Moon novembre okazis miaj prelegoj kaj koncertoj en dekkvin francaj urboj. Estis la unua turneo en mia vivo. Varmege akceptita ĉiuloke, mi ricevis amason da feliĉaj impresoj, kaj, malgraŭ ke la turneon prisilentis ĉefaj E-revuoj, ĝi havis seriozajn bonajn rezultojn por plia vivo. Unue, ĉar mi ricevis moralan aprobon, do la instigon pli aktive verki en Esperanto. Kaj due, ĉar la francan turneon sekvis multaj invitoj, dank’ al kiuj dum postaj jaroj mi traturneis Brition, Finnlandon, Germanion, Italion, k.t.p.

Sincervorte, la turneado ne estas ripoza promeno. Ju pli da grizo venas en mian barbon, des malpli mi deziras forlasi mian komfortan seĝon ĉe la komputilo kaj ekiri al tre foraj lokoj, al nekonataj (eĉ se amikaj) homoj, al ĉiutaga glima ŝanĝo de urbo, lito, al la aŭskultantaro, tute ne ĉiuokaze mia, kaj al ŝvitaj provoj prudente, senprokraste rebati la malkomfortajn demandojn. Endas iam fini. Dek jaroj da turnea pilgrimado rezultigis keston da surpaperaj impresoj, al kiuj endus iam reveni por eventuala publikigo. Sed mi opiniis, ke la fino devas esti en la komenco, do, afable invitita de UFE kaj ties turneo-prizorganto Yves Nicolas, mi refoje iris al Francio .

LA LANDO

Post la rusiaj 30-gradaj frostoj la findecembra Eŭropo renkontis min pluve kaj inunde. La afero estis stranga, kaj mi devis kaŝi funden de la valizo miajn gantojn kaj varman puloveron tuj post eksido en la buso. Per tiu buso, pli-malpli komforta, post 48-hora veturado mi atingis la germanan urbeton Borken. Tie, en la antikva kavalira kastelo, per partopreno en la Internacia Festivalo komenciĝis mia turneo. Tiu festivala semajno inter pli ol 200 esperantistoj el 24 landoj estis mirinda, agrabla, plena de eventoj, kaj indas apartan rakonton (ĝin eblas legi en REGo № 1(14)). Mi nur diru tie ĉi, ke la enprogramitaj por mi tri prezen-

tadoj (unu kun Elena Puĥova – muzikalo "La Eta Princo" laŭ A. de Saint-Exupéry) kaj kvar prelegoj aludis pri minimuma ripozo. Tamen – la amika etoso, la Novjara Silvestrumado kaj multaj aliaj bonaj aĵoj donis la necesan inspiron por mia posta vojaĝo.

Por kompreni, kio ĝi estis, bonvolu preni la mapon. Do, ekde la 5-a de januaro ĝis la 1-a de februaro 2003 mi prelegis-koncertis en Brugge (Belgio), poste en la francaj urboj kaj vilaĝoj Amiens, Tours, Chateauroux, Bourges, Angouleme, Sainte Foy La Grande, Toulouse, Tournefeuille, Beziers, Romans, Lyon, Bourg-en-Bresse, Epinal, Saulxures, Mulhouse, veninte en la fino al Boblingen kaj Heilbronn (Germanio).

Kion mi diru pri Francio? Ĉu, ke la lando estas beluline ĉarma? Ke mi same hejmece kaj komforte min sentis en Pikardiaj kampoj kaj en la grandioza Liono, ĉe la Mediteranea bordo kaj en Vogeza montaro? Ke la lokoj, kiujn mi jam estis vizitinta antaŭ dek jaroj, fariĝis eĉ pli belaj, sed tiuj, kiujn mi vizitis unuafoje, lasis la senton de kompleta ravo?... Ke la francoj, kiuj estas ŝercemaj kiel eŭropaj judoj, kiuj drinketas kiel prudentaj rusoj, kiuj el ĉiu ajn manĝo faras veran feston, kiel nur la francoj kapablas, kaj kiuj amegas bardajn kantojn kiel mi, plenigis mian koron per ĝojo kaj amo?!.. Ĉiuloke mi havis de du ĝis kvin horojn por ekskursi piede, bicikle aŭ aŭte, do, mi enskribis aron da historioj, kiujn mi nun rakontadas al miaj samurbanoj. Jen nur unu por vi.

Ĉie, kie mi estis, mi faris provon akiri ilustritan libreton pri la loko – prefere en Esperanto aŭ en la rusa. Do, en iu, tute ne malgranda urbo, en la plej granda librobutiko mi demandis junan kaj tre simpatian vendistinon pri la libreto en Esperanto. Ŝi neis, ne mirinde. "Sed ĉu en la rusa?" – sekvis la demando. Ŝi neis refoje kun la plej ĉarma rideto. "Fraŭlino, – mi diris, – estas en mia lando 180 milionoj da rusoj. Sed vi ne havas por ili la libreton pri la urbo!" Ne ŝanĝante la ĉarman rideton ŝi respondis tute trankvile: "Estas pli ol miliardo da ĉinoj, sed ankaŭ por ili ni ne havas la libreton..."



En multaj urboj mi rakontis pri Rusia Nordo, pri Vorkuta – ne nepre por provoki miregon, scivolon, embarason aŭ timon – por veki en la animoj de miaj aŭskultantoj fieron pro tiu trezoraĵo, pro la admirinda lando, kiun ili ricevis denaske. Sed kiam en iu el la lastaj miaj prezentoj oni demandis min, kiu urbo pleje plaĉas al mi, mi sincere respondis: "Sankt-Peterburgo". Indulgu min – estas nostalgio...

LA HOMOJ

Miloj kaj miloj da novaj vizaĝoj, krom areto da konatoj, preterpasis min dum la turneo. Mi pene provis memorfiksi laŭeble pli da tiuj, kiuj provokis iamaniere profundan ekscitiĝon aŭ sinceran ĝojon, ridon, larmeron. Ne eblas memori ĉiujn, sed almenaŭ pri tri grupoj mi ŝatus ion diri. Jen estas ili:

– Esperantistoj estis miaj plej afablaj gastigantoj, ĉiĉeronoj, kunbabilantoj, kunkantantoj kaj aŭskultantoj. Ĉiujn-ĉiujn mi kore dankas. Ne ĉiam perfekte parolantaj la lingvon, sed sincere komprenemaj, vi akceptis mian kantadon kaj mian babiladon dum prelegoj, eble tro longan, tre atente, pacience kaj pace. En norda Francio vi heroe promenigis min al la frostaj vidindaĵoj. Kvin-ses gradoj sub nulo ne estas io grava por mi, sed, vidante viajn ruĝajn nazojn, mi sentis penton kaj kompaton. Ĉe Mediteranea bordo vi pacience kaj mire atendis dum mi, ĝoja kvazaŭ infano, demetis la ŝuojn kaj kuris en la ondaron – ja estas memorinda

mezjanuara travivaĵo, donacita de vi! Jes, fojfoje vi postulpetis, ke mi kantu por vi “Kalinka”-n, aŭ la arion de Boris Godunov! Ne estas ofendo por mi, nur granda bedaŭro, ke mi ne sukcesis plezurigi vin – ja mi posedas nek taŭgan voĉon nek taŭgan muzikan kleron por tio... Bonvolu pardoni min.

Reciproke mi tuj pardonis vin, ke eksidantaj amase ĉe restoracia tablo vi momente forgesis ne nur pri mi, sed pri ĉio ĉirkaŭ vi por plensente mergi vin en poparan babiladon, kiel infanoj, revenintaj en la klason post somera feriado. Ja eĉ bela kelnerino, post dekkvinminuta starado apud la gaja kompanio ekkriinta laŭtvoĉe “Voila!!!”, ne tuj akiris vian atenton.

Certe, vi havas problemon – mi vidis ĝin. La movado maljuniĝas. Kelkfoje vi plendis eĉ al mi, ke junularo ne venas al Esperanto, ke lernejestroj ne permesas instruadon de tiu, ke oficialuloj opinias la lingvon io tute neserioza kompare kun la ĉionvora angla... Per kio mi helpu al vi? Ĉu per miaj kantoj kaj rakontoj? Mi faris tion, kelkloke ankaŭ por junaj aŭskultantoj en diversgradaj lernejoj. Jen estas fragmento el la retmesaĝo, veninta hieraŭ: “...ĉu vi scias ke via prelego forte impresis la diversajn homojn? Federacia asocio en la urbo tuj subvenciis nian mezlernejan klubon, kio ebligos al ni tendaran semajnfinon dum la printempo. Ni profitos la okazon por inviti aliajn esperantistojn kaj tiel starigi agrablan etoson.” Eble mia veno donos al vi kelkajn novajn junajn lernantojn. Sed ĉio cetera ja dependas nur de vi mem, – tie, kie vi instruas sindone kaj netriviale, mi kun ĝuo vidis kaj aŭdis flue parolantajn gejunulojn.



– Gazetraportistoj en Francio tute similas siajn rusiajn kolegojn. Mem la evento ilin tute ne interesas. Ili venas antaŭ la komenco por starigi kelkajn demandojn (por kiuj ili, cetere, jam pretigis la respondojn), fari unu-du fotojn kaj haste retiriĝi. Verŝajne, ĉar dum la vespero ili devas ŝvite verkadi la raporton por freŝa gazetnumero. Tion mi komprenas – ja en junaĝo ankaŭ mi peketis, gajnante mian panon per raportista laboro. Mi eĉ estas ravita pro ilia inventemo – jen kaj jen mi vidas asertojn, kiujn mi tutcerte ne diris. Alia afero restas nekomprenita de mi, kaj ĉe okazo mi demandus pri tio miajn raportistojn. Jen la demando: kiu enkapigis al ili tiom fortan antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto, la antaŭjuĝon, kiun preskaŭ ĉiuj ili metas en siajn demandojn? Foje venis eĉ demando: “Kial, viaopinie, Esperanto malvenkis?”. “Do, mi sidas antaŭ vi kaj parolas en Esperanto, ĉu vi opinias tion malvenko?” – mi respondis. Ĉu li aperigis tiun respondon en la publikigita intervjuo – ni vidu.

– Eksteresperanta publiko estis admirinde bonkora kaj interesita pri miaj temoj. Preskaŭ ĉiuloke la prelegejoj plenis, do, mi havis de 40 ĝis 80 atentemajn kaj demandemajn aŭskultantojn. En kelkaj urboj al miaj prelegoj venis rusoj, loĝantaj en Francio, – ili eĉ bone helpis min kanti la rusajn kantojn. La francoj ŝatis ekkoni ĉion plej detale, do niaj publikaj konversacioj daŭris foje kvar horojn. Malgraŭ mia averto, ke mi ne estas ŝtatestro (lin vi ricevis tuj post mia foriro) kaj ke mi prezentas nur la personan opinion de simpla rusiano, amase venadis la demandoj pri koruptonivelo en la lando kaj pri eventuala fino de la milito en Ĉeĉenio, pri nuna ekonomia situacio kaj ties perspektivoj, pri evoluo de la vivnivelo k.t.p. Sincere respondinta ĉiujn viajn demandojn, mi petas vin ne disreviĝi, se ion alian vi aŭdis poste

de la ŝtatestro. Certe, pli facile mi trovis la respondojn por la demandoj, ligitaj al mia persona vivo kaj laboro, eĉ se tre specialaj, kiuj venis de la ĉeestintaj fakuloj pri elektro. Tiuj specialaĵoj estis tamen problemo por miaj interpretantoj, – ja mi respondis en Esperanto ankaŭ pri elektra kurento kaj tensio. Mi tenas en mia menso sinceran kompaton por la tradukinto Jean Claude en Liono. La rusa poezio estis mia temo, do imagu, kiom malfacilas interpreti poemojn eĉ ĉe brila lingvoposedo! Sed la publiko, laŭ mi, restis kontenta, kaj tiu kontento pravigas la ŝvitadon de Jean Claude.

KONKLUDE

Iom da kalkuloj. En ĉiu urbo mi havis de unu ĝis tri prezentojn, do ni parolu pri du. La kvanto de aŭskultintoj variis inter dek kaj okdek – ni prenu ion minimume mezan – 30. La simpla aritmetiko atestos do, ke mi alparolis milon da homoj, sen kalkuli la partoprenintojn de la Internacia Festivalo.

Konsiderante dudekon da artikoloj en loka gazetaro, ĉu mi rajtas diri, ke per aŭ pro mia veno refojan pozitivan informon pri Esperanto ricevis almenaŭ cent mil personoj? Tiuokaze mi opinias la inviton de UFE pravigita, ĉar la ĉefa tasko de mia turneo estas farita taŭge.

Ŝparante paperon kaj la tempon de legontoj mi nur diru pri kelkaj aferoj, la plej elstaraj:

– La plej grava frosto (-6 gradoj!) estis en Amiens, la 8-an de januaro. Eble ankaŭ dank' al tiu frosta vetero mi ricevis en Amiens la plej interesitan publikon.

– La plej bona interpretinto ŝvite kunlaboris en Sainte Foŭ La Grande. Estas Marie-Helene Desert, kiu brile tradukadis eĉ tre specialajn demandojn.

– La plej okulfrapan titolon de gazetartikolo mi prezentu en la origina lingvo: Mon pays, ce n'est pas un pays, c'est l'hiver[1] (L' echo, Lundi 13 janvier 2003).

– La plej kantema Esperanto-grupo kunvenis en Bourg en Bresse. La venintoj kunkantis ne nur la vaste konatajn E-kantojn, sed ankaŭ la miajn, kio estis tre flata.

– La plej agrabla surprizo estis apero de miaj tradukoj en Francio. Jacques Le Puil eldonis miajn "Elpensaĵojn kaj tradukojn" kiel LKK-Krom.

– La plej varma kaj suna vetero (+16 gradoj) estis en Beziers, kaj mi ĝuis tiun somereton januaran.

– La plej bonkoraj kaj gastamaj estis ĉiuj miaj gastigantoj, do mi deziras sincere kaj tutanime danki ĉiujn por mia komforta vivo dum tuta januaro.

– La plej bela neĝo falis dum la lasta tago de mia restado en Francio. Ĝi falis en Vogezoj la 29-an de januaro, komprenigante al mi, ke venis la tempo por reiri al Rusio.

Do, mi iris, kaj lunde, la 3-an de februaro, veninte frumatene al Sankt-Peterburgo, tuj eklaboris en mia ofico. La agrabla feriado venis al fino kune kun mia lasta turneo. Mia komputilo tre sopiris mian venon, do, ĉiuvespere instalante min ĉe la ekrano, mi sentas preskaŭ aman kontenton en ĝia zumado. Kaj mi ĵuras, ke mi ne lasos ĝin por longe en la proksimaj jaroj. Tamen, se en 2013 (bona tradicio, ĉu ne?) UFE decidos denove voki min, – mi forgesos mian tiaman aĝon, kaj iros en Sankt-Peterburgon por aĉeti la bileton por pli-malpli komforta buso. Ĉar bone kaj tute prave diris iu rusa poeto: " Ni amas la domon, kie oni amas nin."

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

[1] "Mia lando, ĝi ne estas lando, ĝi estas frosto"

Bulteno de REU

ALVOKO POR LA “KLUBA RANGLISTO”

En la 19-a Konferenco de REU (Puŝĉino, 2002) estis vigle diskutita la temo pri la kluba agado. Kiel organizita formo de poresperanta aktiveco ĝi estas konsiderata kiel tre grava por sukceso de E-movado en Rusio. Bedaŭrinde, dum lastaj 10-15 jaroj la kvanto de E-kluboj signife falis. Tion kaŭzis kaj objektivaj cirkonstancoj, kaj subjektivaj. Kaj el tiuj malmultaj sukcese agadas eĉ pli malmultaj.

De alia flanko, ioma socia stabiliĝo dum lastaj 3-4 jaroj donas esperon, ke grava parto de E-movado kiel E-kluboj povas jen reaktiviĝi, jen aperi. REU-Estraro esperas, ke E-kluboj en Rusio plimultiĝos kaj ilia rolo iĝos pli aktiva. De sia flanko REU ĉiurimede helpas kaj asistas por tiu agado: en la antaŭa Jarlibro estis teksto pri tio, kiel registri E-klubon, kiel verki statuton k.a.

Antaŭ kelkaj jaroj estis iniciatita konkurso inter E-kluboj – “Kluba Ranglisto” (RoKo). Ĝia celo estas objektive taksi sukcesojn de kluboj surbaze de poentara sistemo. Por levi intereson pri partopreno en la konkurso, aperis ideo establi la Fonduson “Kluba Ranglisto” por mone premii la gajnintojn en la konkurso. En marto 2003 la Regularo pri la fonduso estis aprobita de la REU-Estraro.

Kune kun tiu ĉi numero de REGo vi ricevos la Jarlibron 2003, kie troviĝas konformaj Regularoj kaj baza Poenta Sistemo. Ĉiuj kluboj – membroj de REU ricevos ankaŭ la enketilon pri RoKo. Aliaj kluboj (kiuj samrajte povas partopreni en la Ranglisto) povas ricevi la enketilon, sendite koncernan peton al la adreso de REU.

REU-Estraro kaj Komisiito pri RoKo alvokas <u>ne heziti</u> montri siajn atingojn kaj sukcesojn al la Esperanto-popolo! Kaj aktive partopreni en la konkurso. Des pli, ke pleniginte simplan formularon vi povas gajni monon por via klubo!

KION NI PENSAS PRI LA STRATEGIO DE LA MOVADO?

Komence de la jaro mi proponis demandaron pri la temo, kiu estis publikigita en REGo kaj dissendolisto <reu-agado>. Mi esperis, ke reeĥos multaj esperantistoj kaj mi sukcesos fari iun resumon de la opinioj, surbaze de kiu ni sukcesos ellabori iun komune akcepteblan strategian planon por, almenaŭ, proksimaj jaroj, konforme al kiu ni povos pli celkonscie evoluigi nian movadon. Sed, bedaŭrinde, respondis nur sep personoj (inkluzive min mem), du el kiuj, kvankam estas “niaj homoj”, loĝas ekster Rusio. Tamen ili ĉiuj estas homoj kompetentaj pri la movado, kaj konsideri iliajn opiniojn estus ĉiuokaze utile por ĉiuj. Do, mi prezentas iliajn respondojn plene – ja ĉiu el ili enhavas iun parton de la komuna vero pri ni, iun riveliĝon de la “socia konscio” de la rusiaj esperantistoj, kia ĝi estas nuntempe. Eĉ se apartaj opinioj iom kontraŭdiras inter si, tio montras la realajn kontraŭdirojn, surbaze de kiuj ja evoluas nia movado! (Noto: ne ĉiuj respondis ĉiujn demandojn.)

Nikolao Gudskov (Moskvo)

1. Celoj de E-movado en la tutmonda skalo. Kion, finfine, strebas esperantistoj?

Slavik Ivanov (SI). Mi ne povas respondi por ĉiuj. Persone mi strebas lingvan demokration. Mi vere malŝatas la nunan situacion kun premado de la angla (kaj en regionoj – de kelkaj regionaj lingvoj). Tio mortigas multajn interesajn lingvojn kaj devigas homojn ĵeti multe

da fortoj al lernado de pli “bezonata” lingvo. Esperanto, ŝajne, povus solvi tiun problemon.

Eŭgeno Perevertajlo (EP). Kiam Ĉapajev estis demandita pri lia preferata Internacio, li demandis “Kiun Internacion preferas Lenin?”. Mi same demandos “Kiun celon havis L.L.Zamenhof, kreonte sian lingvon?”. Li volis, ke lia lingvo estu uzata kiel INTERNACIA lingvo, t.e. lingvo inter nacioj. Ankaŭ mi volas, ke Esperanto estu uzata ĉe la unua etapo kiel ponta lingvo.

Garik Kokolija (GK). Laŭ mi ne ekzistas iuj certaj celoj, al kiuj strebas ĉiuj esperantistoj. Diversaj esperantistoj havas diversajn celojn. Persone mi per mia agado simple strebas fari ion konkrete utilan por la lingvo, movado aŭ apartaj esperantistoj.

Jurij Karcev (JK). Nu, se finfine, do nepre fina venko (dume ni ne parolu pri raŭmistoj). Tamen la difinoj povas esti tre diversaj. Ekzemple, Esperanto kiel agnoskita lingvo de internacia komunikado. Fakte, tio estas nur unu el la eroj, sed se ni atingos rekonon de E-o kiel natura rimedo por eksterlandaj kontaktoj – la ceteraĵoj poiomete aperos mem. Aŭ, komence, ni diru “unu el naturaj rimedoj” – tion eble ne neos eĉ plej konvinkitaj raŭmistoj.

Mikaelo Ĉertilov (MĈ). Vasta uzado de Esperanto por internaciaj kontaktoj en ĉiuj sferoj: politikaj, ekonomiaj, sociaj, kulturaj k.t.p.

Vladimir Minin (VM). E-o estu grava internacia komunikilo en la tutmonda skalo.

Nikolao Gudskov (NG). Esperanto devas finfine fariĝi “la dua lingvo por ĉiu” kaj poste – la ĉefa interkomunikilo por la unuiĝonta homaro. Ĉiuj ceteraj celoj, eĉ se provizore utilaj, estas nur portempaj; sen vido de tia perspektivo nia afero estas senutila.

2. Kion, konsiderante la ĝeneralajn celojn de la movado, devas strebi landaj movadoj kaj asocioj?

> REU-Estraro informas, ke la Seminario pri kluba laboro, anoncita por 09-11.05.2003 apud Moskvo, okazos enkadre de RET-03 en aŭgusto.

SI. Esperanto nur tiam iĝos vere utila ilo, kiam en kelkaj diverslingvaj landoj aperos sufiĉe multaj E-parolantoj. Do, mi opinias, ke lokaj asocioj devas plej unue informi, instrui kaj konstrui eblojn por posta uzado de Esperanto. Estas iom malfacile balancadi inter multaj agadterenoj – asocioj jen foriras nur al informado, jen nur al someraj tendaroj, jen nur al instruado. Devas esti kaj-kaj-kaj.

GK. Landaj asocioj laŭ mi devas havi du ĉefajn celojn: a) pligrandigi la kvanton de esperantistoj en la lando; b) doni al la esperantistoj bezonatajn por ili servojn (aranĝojn, kontaktojn, librojn, gazetojn, diskojn, kursojn ktp.).

JK. Pretigi la ilojn kaj informi la socion. La ĉefa bezonataĵo – la lingvo mem – estas sufiĉe bone evoluinta dum pli ol cent jaroj. Ni havas plenan kaj ilustritan vortaron, akademiaĵojn kaj eĉ netuŝeblan fundamenton. Nun necesas krei “infrastrukturon”, por ke ni povu proponi al la mondo jam pretajn solvojn – “lerni E-on kaj…”. Ekzemple “lerni E-on kaj partopreni en gaja internacia maskobalo” aŭ “lerni E-on kaj labori en volontula konstrutaĉmento”. Se temas pri landa nivelo de kunordigo, necesas pretigi nacilingvajn lernolibrojn, efektivigi en la landoj informadon pri E-o kaj ties ebloj, krei reton de perantoj (varbantoj).

MĈ. Landaj movadoj kaj asocioj devas strebi al: pli vasta informado en siaj landoj pri Esperanto kaj ties avantaĝoj; pli densa kunlaboro kun aliaj landaj asocioj kaj movadoj surbaze de komunaj projektoj; kunlaboro kun registaraj organizaĵoj pri ŝtataj programoj, kunligitaj kun internaciaj, interkulturaj kontaktoj, kun edukado k.t.p.

VM. Landaj movadoj kaj asocioj liveru kvalitajn servojn, por ke la membraro povu uzi E-on en ĉiuj kampoj de internacia komunikado.

NG. La landaj movadoj devas: a) disvastigi Esperanton inter neesperantistoj; b) krei komfortan atmosferon por ekzisto kaj evoluo de sialandaj esperantistoj; c) krei interrilatojn kun landaj registaraj kaj nerigistaraj organizaĵoj, kiuj plibonigas efektiviĝon de la celoj a)

kaj b); ĉ) kiel eble plimultigi kontaktojn de sialandaj esperantistoj kun la alilandaj; d) per ĉiuj siaj supremenciitaj agadoj prepari socian opinion inter esperantistoj mem kaj en la ekstera publiko ke la Fina venko de Esperanto estas la sola inda solvo de la lingva problemo en la tutmonda skalo.

3. Kian lokon devas okupi la rusia movado ĝenerale kaj REU speciale?

SI. Rusoj ne malpli ol hungaroj aŭ ĉinoj estas interesataj ne turmentiĝi pri la angla (kiu estas pli facila por francoj, svedoj aŭ germanoj). Do en Rusio la rolo de Esperanto devas ankoraŭ pligrandiĝi. Se ŝtata agnosko kaj subteno de Esperanto en malgrandaj landoj povas esti nerimarkebla, en Rusio ĝi povus ŝanĝi (almenaŭ influi) la mondan lingvan situacion. Estas iom alia demando: ĉu la Federacio en ĝia nuna stato vere bezonas Esperanton? Ja estas tute logike proponi Esperanton por la rolo de federala lingvo (same kiel oni proponas Eon por iĝi komuna lingvo de Eŭropo). Sendube, progreso de Esperanto en nia lando povas renkonti ankoraŭ multajn subitaĵojn.

EP. Ni, vi, karaj miaj, devas esti fieraj, ke Esperanto naskiĝis en Rusio, en la rusa lingvo, ke LLZ lernis en MGU, ke malgrau tio, ke Esperanto havas eŭropan leksikonon, ĝi havas pure rusan spiriton. Tio signifas, ke rusianoj havas specialan respondecon antaŭ Esperanto kaj ĝia evoluo. REU devas esti modela asocio. Sed tio estas en tre malproksima estonteco. Tamen, kiu scias, en Rusio okazis multaj renversoj kaj revolucioj. Povas esti, ankaŭ la rusia Movado renversiĝos...

JK. Principe, nenio absolute speciala estas en nia lando kaj nia movado. Tamen iu ja devas esti motoro de la movado. Tio rilatas kaj al homoj, kaj al landoj. En ĉiu periodo estis landoj-gvidoroj, al kies atingoj strebis aliaj esperantistoj de la mondo. Ni certe povus esti tia lando, se efike laboros. Se ne, do almenaŭ kontribui al la monda procezo.

MĈ. Almenaŭ ne lastan lokon inter aliaj. REU povas roli pli grave, se ĝi serĉos kunlaborojn kun aliaj asocioj kaj movadoj en Rusio.

VM. Avangardan.

NG. Rusia E-movado devas, por la komenco, fariĝi komparebla kun la movado en la plej avancaj tiuilate landoj (Hungario, Francio ks.). Pensi, ke eblas atingi tion sen nepra partopreno de la landa asocio, estas stultaĵo.

4. Kiaj etapoj de evoluo de la movado antaŭvideblas ĝenerale kaj en Rusio speciale?

SI. Nenio antaŭvideblas, kiam oni parolas pri lingvoj. Mi pri nenio mirus.

EP. La unua etapo devas esti trovo (fakte ili estas al ĉiuj konataj) de la kampoj, kie Esperanto povas esti utiligata kiel normala ekonomia lingvo. Necesas bone klarigi al la "kamparanoj", ke Esperanto TREEGE helpos en la laboro ĉe la kampo. Poste ni aranĝu instruadon pri Esperanto al la homoj, kiuj laboras ĉe la kampoj.

GK. Mi ne riskas aŭguri, ĉar tio dependas: a) de la situacio en la lando; b) de la personoj, kiuj gvidos la movadon.

JK. Dependas de la elektota strategio. Ekzemplon vidu sube.

MĈ. Movado iĝas pli videbla en la socio dank' al: socisignifaj projektoj, kiuj plialtigas respekton flanke de aliaj landaj movadoj kaj asocioj, kaj pliinteresigas popolon pri E-o ĝenerale; kontibuo al ŝtataj programoj en internaciaj, interkulturaj, edukaj sferoj; engaĝiĝo en interŝtataj programoj (aparte en kadroj de Eŭropo), kunlabore kun alilandaj E-asocioj; ĉiea enkonduko de E-o kiel unu el laborlingvoj en internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj.

VM. Organizaĵoj, kiuj bezonas internacian agadon, uzu E-on. (Ekz-e: verduloj, kontraŭtutmondistoj, ŝatantoj de scienc-fikcio kaj fantasto, diversaj fakuloj kaj multaj aliaj.)

NG. Bedaŭrinde, sed estas nur konstato de la nuna stato de la movado; ni devas reatingi la nivelon de la 1920-aj jaroj, kiam Esperanto havis pli bonajn perspektivojn en la ekstera

mondo, kaj kvante nia lingva konunumo superis la nuntempan nivelon. Nur tiam ni povos ekmoviĝi antaŭen. Por tio ni nepre devas lerni kaj saĝe apliki la tiaman sperton. Nur poste ni povos moviĝi antaŭen. Al Rusio tio rilatas eĉ pli, ol al aliaj landoj, pro du kaŭzoj: 1) kvanta falo de la movado en nia lando estas pli signifa ol en plejmulto da landoj; 2) en la 1920-aj jaroj nialandaj atingoj estis tre signifaj, sekve, la tiama sperto meritas profundan studadon.

5. Kiaj labordirektoj devas esti prioritataj en tiuj etapoj?

SI. Mi kredas, ke nun la prioritata labordirekto de la landa asocio devas esti strebo al oficiala agnosko de Eo kiel lernobjekto. Almenaŭ kadre de "lerneja" aŭ "regiona komponento". Devas aperi programo ktp. Post tio necesus organizi preparadon de instruistoj en altlernejo(j). La sola vojo al vera sukceso de la lingvo estas mezlerneja instruado, prefere deviga. Tion atestas historio de ajna etna lingvo. Agnosko de Esperanto kiel instruebla lingvo povus utili ankaŭ por pli serioza vizaĝo de la movado. Dume ni aspektas kiel iuj stranguloj, okupiĝantaj pri iu kvazaŭ-lingvo. Tiam ni estos simple lingvemuloj – kiel tiuj, kiuj ŝatas lerni la francan, ekzemple.

Informo de ĈALK: 10.04.03 faris A-nivelan (elementan) ekzamenon kun la noto "Perfekte" Valentina Sidorova (Moskvo).

GK. En proksimaj jaroj prioritatoj devas esti jenaj: variigo kaj stabiligo de la servoj; organizado de la kursoj; popularigo de la aranĝoj; establo de kontaktoj kun la movadoj en aliaj landoj.

JK. Kiel jam estas skribite, necesas prepari "infrastrukturon". Por ke la socio, turninte sin al Esperanto, trovu tie jam pretan solvon de kelkaj siaj problemoj. Tio signifas, ke ĉiu deziranto povu trovi en sia apudeco: 1) aktualan informon pri E-o kaj ĝia utileco en certaj kazoj; 2) lernolibrojn en librovendejo kaj biblioteko (t.e. tie, kie oni kutimas serĉi librojn); 3) kursojn, ĉeestajn aŭ almenaŭ korespondajn; 4) funkciantan klubon, kie oni povu praktiki la lingvon, aŭ almenaŭ aktivulojn, pretajn helpi pri tio; 5) eblojn praktike uzi la lingvon, jam ne kiel trejnado, sed por iuj celoj. Tiuj celoj povas esti absolute diversaj, de filatelio ĝis edziniĝo, laŭ onia gusto, sed E-o servu kiel ilo sed ne celo. Parolante pri apudeco, ni strebu plivastigi tiun reton profunden. Nun ni povas celi havi tiujn eblojn en ĉiu regiona centro, poste temos pri distriktoj ktp. Jen ekzemplo pri la etapoj. Certe en Interreto tio devas ekzisti unuavice.

MĈ. Praktika uzado de Esperanto en projektoj komunaj kun neesperantistoj devas esti unu el ĉefaj labordirektoj. Nur se homoj vidos praktikan utilon kaj laborkapablon de la lingvo ne onidire, sed en konkreta laboro, nur tiam ili mem eklernos la lingvon. Nura reklamado, ĉu televida, ĉu metroa, nenion donas, se oni tuj kunpuŝiĝos kun nenieuzado, neniautilo.

VM. Ĉiuj, kiuj kontribuas al internaciaj kontaktoj per E-o.

NG. Al la supraj opinioj mi povas aldoni nur jenajn du aferojn: 1) konstanta kunagado kun ŝtataj instancoj (tie necesas almenaŭ tede demonstradi nian ekziston), kaj ne nur kun la ministerio pri klerigo, sed ankaŭ kun tiu pri eksteraj aferoj ks.; 2) konstante montri nian ekziston kaj utilecon al neregistaraj organizaĵoj, inter ili gravas la plej aktivaj socie.

6. Kiuj konkretaj aranĝoj (ekz., UK en Rusio) povas esti utilaj kaj kiuj – malutilaj vidpunkte de la ĝenerala strategia plano? Kial?

SI. En 2004 en Rusio kredeble okazos IJK. Tio, laŭ mi, dume sufiĉas por integrigi la landon en la tutmondan E-reton. Devontus aperi novaj ligoj, novaj konatoj, novaj kunlabordirektoj. Mi dubas, ke en Rusio vere urĝe bezonatas UK. Fortoj en la lando ne estas tiom multaj por disĵeti ilin al "internaj" aferoj, kia ja estas UK. Krome, organizado de UK estas ĉiujara afero – UK en Rusio ne iĝos io vere nova, nur vica UK kaj nenio pli. Estas tute alia afero, se UK alportus grandan monon al REU. Se UK helpus konsiderinde perlabori, tiam indus ĝin okazigi por pliriĉigi nian landan movadon. Sed mi ial dubas, ke UK povas helpi

fondi rusian grezijonon, konstantan oficejon de REU aŭ ion similan.

EP. En Rusio devas esti aranĝataj seminarioj, simpozioj, kolokvoj k.s. pri praktika utiligado de Esperanto. Laŭ mi UK, IJK kaj la similaj estas absolute malseriozaj kunvenoj de pigruloj, kiuj venis por ripozi, kaj dezirantoj esti amuzataj.

GK. Ĉiuj bone preparitaj aranĝoj estos utilaj, malbone preparitaj – malutilaj.

JK. Utilaj povas esti tiaj aranĝoj, kiuj donos pli grandan enspezan rezulton ol elspezitaj fortoj. Pri UK en Rusio mi iom dubetas tiusence. Povos okazi, ke ni por kelkaj jaroj forlogu nin por ĝia preparado, okazigu tre interesan UK, pri kiu parolos la tuta ekzistanta esperantistaro, sed kio plu? Se ni ne sukcesos organizi trafan "PR" en la lando, kion tio donos? Jen okazis SAT-kongreso; kion ĝi rezultigis, krom ioma mongajno kaj sento de profunda sukceso? Do, verŝajne, utilaj estas tiaj aranĝoj, kiuj helpas evoluigi la strukturon, priskribitan supre. Kaj la utilecon ni mezuru ĝuste laŭ tiu skalo.

MĈ. UK certe. Sciencaj, apudsciencaj, intermovadaj k.t.p. konferencoj, seminarioj. Ekzemple tiu, pri kiu parolis A.Junusov.

VM. Ĉiuj, kiuj kontribuas al internaciaj kontaktoj per E-o.

NG. Kiam, kaj se, ni havos pli stabilajn rilatojn kun registaraj instancoj, tiam, tutcerte, UK. Sen tio ĝi povos fariĝi eĉ malutila. Tre utile estus organizi komunajn aranĝojn kun sciencistoj, kondiĉe, ke Esperanto estu unu el egalrajtaj laborlingvoj, kaj inter kontribuantoj al tiuj konferencoj, seminarioj, rondaj tabloj ks. almenaŭ kvarono da partoprenontoj estu esperantistoj. Treege utila por la movado estus ĉiam pli granda intenaciigo de RET-oj, REK-oj ktp.

7. Kia ideologio de la movado estas plej celkonscia konsiderante ĝeneralan strategian celon de la movado?

SI. Mi ne emas pri tio pensi. Mi jam menciis, ke al mi ŝajnas tre grave eklabori pri oficialigo de E-instruado. Mi nun (kun)organizas kurson de Eo en Peterburgo – multaj interesatoj telefonas kaj inter la unuaj demandoj interesiĝas pri nia instru-licenco, pri atesto de la instruisto kaj similaj paperaĉoj. Homoj ofte estas trompataj pri ĉio, ankaŭ pri fremdaj lingvoj, kaj ili pli kaj pli ofte demandos nin pri niaj rajtigaj dokumentoj. Krom ĈALK kaj la sigelo de REU ni ja nenion havas ĉi-kampe. Aŭ mi eraras?

EP. Ni estas samideanoj, t.e. anoj de la sama ideo. La ideo estas sola, ke Esperanto devas esti internacia lingvo, t.e. lingvo kompreniganta la homojn de diversaj nacioj, parolantajn denaske en diversaj lingvoj.

GK. Mi ŝatus ke la ideologio estu – realigi la plej bezonatajn konkretajn planojn.

JK. Mi ne tuŝis la ideologion, respondante la unuajn ses demandojn. Estas tre komplika kaj tikla afero, kvankam eble la plej grava. Kelkaj opinias, ke ni ne devas zorgi pri la ideologio, liverante al la mondo nur lingvajn servojn. Aliaj vidas en E-o rimedon por plibonigi la mondon. Krome, ekzistas ankaŭ opinio, ke la ideologio, komence enmetita de Zamenhof, mem evoluigos la mondon (t.e. ni proponu la lingvon, kaj ĝi mem faros ĉion necesan). Eble ni lasu ĉiujn ideologiojn ekzisti (ne elektante el ili la plej celkonscian), akumulante fortojn por tiuj evidentaj celoj, pri kiuj konsentos plejmulto de esperantistoj – homoj, kies profesio aŭ okupo estas Esperanto.

MĈ. Ideologio de malfermiteco, aktiva serĉo de kunlaboro kun neespa medio. Aktiva popularigo. Ĉiu movadano en sia loko, en sia laboro, en sia socia agado devas pensi pri praktika uzado de Esperanto kaj kunlaboro kun Esperanto-movado. Ĉiu Espa renkontiĝo, aranĝo, projekto devas havi malfermitan karakteron, en senco de aktiva invito al kunlaboro de koncernaj neesperantistaj movadoj, asocioj, simple publiko. Kaj tio devas esti ne marĝena, sed unu en ĉefaj programeroj de la aranĝoj.

VM. Ni devas esti toleremaj pri ĉiuj specoj de E-agado. Ni devas uzi ĉiujn eblojn por in-

formi pri E-o. Ju pli multe oni aŭdus kaj parolus pri E-o, des pli estus bone. Ekz-e ni informu eĉ: pri arestitaj e-istoj en Moskvo, pri spiona reto de e-istoj (membroj de Komunista Internacio) en multaj landoj, kiu spionis favore al Sovetio, pri avantaĝoj de E-o antaŭ la angla (la ĉefa rivalo de E-o), pri multo alia... Ni atentigu pri E-o en diversaj ŝtataj kaj sociaj kampanjoj (ekz-e en landaj popolnombradoj ni menciu, ke nia nacio estas esperantistoj, kaj nia origina lingvo estas E-o).

NG. Ne refutante neŭtralecon kiel tian, ni devas fariĝi malpli neŭtralaj rilate al sociaj problemoj, kiuj havas internacian kaj tutmondan karakteron. Aktiva partopreno en movadoj por la homaj rajtoj (kiel proponis, estante prezidanto de UEA, Kep Enderby), en la elpaŝoj de kontraŭtutmondistoj, nepra kunlaboro kun diversaj pacistaj, antimilitaristaj kaj ekologiistaj organizaĵoj faros la aspekton de la movado pli difinita kaj ebligos al ni okupi pli certan lokon inter aliaj neregistaraj organizaĵoj, kaj fariĝi, finfine, reale utilaj por ili kiel lingvaj perantoj en iliaj internaciaj kontaktoj. Nur sur tiu vojo Esperanto-movado povos, finfine, montri la manieron por realiĝo de alternativa, demokratia tutmondiĝo, kiu sen la neŭtrala internacia lingvo ne eblas.

RETEJO UEA.ORG ESTAS RENOVIGITA

Post pluraj monatoj da persista laboro la retejo <uea.org> ŝanĝis sian jam kutiman malhelverdan koloron je intensa blua. Krome, ŝanĝiĝis kaj iĝis pli oportuna la navigado en la retejo. Aldoniĝis kaj aktualiĝis pli ol triono el ĝiaj nunaj 934 paĝoj. Enhave la retejo nun pli similas al siaspeca reta Gvidlibro pri Esperanto-movado. Ĉi tie estas listoj de landaj asocioj, fakaj asocioj, kulturaj centroj kaj kursejoj, partoj pri informado, instruado, listoj de retaj grupoj por UEA-membroj... La laboron efektivigis Dirk Bindmann (Germanio), kiu laboris pri la aspektigo kaj navigado, kaj Andrej Grigorjevskij (Rusio), zorginta pri la enhavo kaj rekodigo. Pri rimarkitaj eraroj, kun ĉiacpecaj rimarkoj, bonvolu turni vin al la adreso <reto@uea.org>.

(uea-membroj)

INFANOJ EL MULTAJ LANDOJ

Kiel kutime, okazos paralele kun la Universala Kongreso en Gotenburgo aparta internacia aranĝo por infanoj. Jam aliĝis al la Internacia Infana Kongreseto infanoj el Francio, Hungario, Kubo, Norvegio, Rumanio kaj Svedio, kun interesiĝoj el Britio, Germanio kaj Japanio. Ni havas kvar gvidantojn, du el ili estas svedlingvaj, kaj bonvenigas pliajn infanojn. Ili estu inter 6- kaj 13-jaraj kaj kapablu paroli Esperanton. Ĝis la 31-a de majo partopreno kostas 245 eŭrojn (215 por B-landanoj). Tio inkluzivas loĝigon, ĉiujn manĝojn kaj la programon.

La kongreseto okazos en Lerum, 18 km for de Gotenburgo, en la loko nomita Knappekulla. Ni loĝos en lignaj dometoj ĉirkaŭ centra manĝejo kaj kunvenejo. Tuj apude estas freŝakva lago kun sabla fundo kaj tre pura akvo. Estas plie arbaro kun mirteloj, loko por libere ludi kaj futbal-tereno. Promenaj vojetoj preterpasas vilaojn, somerdometojn kaj unu/du farmbienojn kun bestoj.

Riĉa programo estas en preparo. En Borås, 50 km for, troviĝas granda bestoĝardeno kun elefantoj (elefantido ĵus naskiĝis), ĝirafoj, delfenoj, nordaj bestoj k.t.p. Eblas uzi la buson por ekskurso tien. Oni kunportu manĝon kaj sidu en la parko.

Petu aliĝilon kaj anoncu aliĝojn al: Stefan MacGill, Pannonia u. 30, I, 6, HU-1136 Budapest, Hungario; <stefan.macgill@galamb.net>. Pagojn direktu al la Centra Oficejo de UEA aŭ via landa kongresa peranto. Pliajn informojn kaj elpreseblan aliĝilon oni povas vidi ĉe la hejmpaĝo de UEA, sub “Kongresoj”.

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2003

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva E-klubo "MASI-FaRo" (+1 nova membro): *Sigaĉjov Aleksandr*

Sankt-Peterburga E-societo "Espero" (la listo): *Aksjonova Marina, Butkeviĉ Anna, Lisiĉnij Ivan*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Ĉerepanov Valerij (Moskvo), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Gazizov Gafurjan (Salavat), Gorŝkov Miĥail (Niĵnij-Novgoroda reg.), Jegorov Valerij (Sankt-Peterburgo), Kopajev Jurij (Orjola reg.), Kovaljova Valentina (Novosibirsk), Lisova Viktorija (Sankt-Peterburgo), Mamkin Mansur (Tjumenj), Matusov Jurij (Sankt-Peterburgo), Paseĉnikov Jurij (Tomsk), Privalov Vitalij (Kostroma), Semjonov Aleksandr (Leningrada reg.), Sibircev Vladimir (Novosibirsk), Sokolova Evelina (Krasnojarsk), Stepanov Pjotr (Novosibirsk), Ŝevĉenko Jelena (Moskvo), Ŝmakov Vladimir (Novosibirsk), Udalova Irina (Taganrog), Zajceva Irina (Vladimira reg.)

FAMILIA MEMBRO

Privalova Oljga (Kostroma)

KOREKTO

En la listo de individuaj membroj de REU por 2003, publikigita en la antaŭa numero de REGo, anstataŭ Anĵela Saviĉeva (Novosibirsk) devas esti Anĵela Belenko (Novosibirsk).

REU-kotizoj por la jaro 2003:

120 rub. (por eksterrusianoj – 15 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);
3000 rub. (por eksterrusianoj – 375 eŭroj) – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);
25 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco);
120 rub. + 25 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, la membrokartoj kaj voĉdonrajtoj en REU-Konferenco por la klubanoj).
La rublaj kotizoj sendendas al ***G.Kokolija*** *(la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto* ***reua-p*** *ĉe UEA.*

Juna virino portanta bebon eniris apotekon kaj petis de la komizo permeson pesi la bebon per la bebo-pesilo.

– Mi bedaŭras, sinjorino, – la komizo respondis, – nia bebo-pesilo rompiĝis. Sed ni povas pesi kune la patrinon kaj la bebon, kaj poste pesi la patrinon sole. Tiam ni subtrahos la duan nombron el la unua nombro kaj tiel konstatos la pezon de la bebo.

– Ho, tio ne sukcesos, – diris la juna virino, aspektante iomete ĝenata.

– Kial ne, sinjorino? – demandis la komizo.

– Ĉar, – ŝi diris, – mi ne estas la patrino – mi estas la onklino.


(esperanto-anekdotoj)

REJM-info

redaktas Sonjo Ŝejnina, Vitalij Malenko

KIO NUN OKAZAS EN LA RET'

Delonge Esperanto-komunumo bezonis sian interagan paĝaron, similan al ruslingvaj Lenta.ru, Strana.ru kaj aliaj – kun konstante renovigata novaĵ-bendo kaj ebleco por vizitantoj tuj pridiskuti la novaĵojn. Fakte, eĉ estis provoj fari ion similan: <www.esperanto.nu>, ekzemple.



Ĉi-januare la delonga revo kaj bezono de internacia publiko realiĝis en la kolektiva kreaĵo de kelkaj brazilaj esperantistoj, kiu ricevis strangan nomon Ĝangalo kaj "iksisman" adreson <www.gxangalo.com>. Mi ĉiutage vizitas Ĝangalon por ekscii la plej freŝajn novaĵojn de Esperantio kaj cetera mondo, por foje kontribui kaj simple pridiskuti la novaĵojn en vere internacia medio de aliaj konstantaj vizitantoj. Aktualeco de Ĝangalo igas min forgesi pri iom troa pezeco de la paĝo-kodo kaj pri foje tro eksperimenta por mi lingvaĵo de la redakcio. Interalie la redakcio de Ĝangalo uzas "Plenan Esperantigon de Nomoj (PEN)", kio tre helpas legi aperantajn en la novaĵoj nomojn.

Iom da fanfaronado eblas ankaŭ por ni, rusianoj, ĉar ni sufiĉe bone progresas pri ekstera informado kaj instruado en la Reto. Daŭre aperadas la reta dissendo "Novosti esperanto-dviĵenija"[1] – por *pli ol 4 000 abonantoj*. Se vi jam havas retaliron, sed ne jam abonas la dissendon, vizitu la paĝaron <www.ikso.net/novosti>. Dank' al helpo de svedo Hokan Lundberg kaj ruso Dmitrij Laŝunin en la paĝaro fine de marto aperis belega forumo, uzanta modernan programaron phpBB 2.0.4. Similaj forumoj estas tre popularaj en la Reto nun, kaj estas tre bone, ke esperantistoj iĝas atingeblaj ne nur ce *YahooGroups*[2]. Ekde apero de la forumo nombro de ĉiutagaj vizitantoj ĉe <www.ikso.net/novosti> triobliĝis kaj atingis 300-400 vizitojn tage.

Esperantistoj ne nur agas "en sia teritorio", sed ankaŭ vizitas popularajn renkontiĝejojn de retumantoj: forumojn, babilejojn, publikajn taglibrejojn. Tie ofte aperas prilingvaj temoj, kaj opinio de esperantisto ne plu estas raraĵo ĉi-okaze. Tamen bezonatas eĉ pli aktiva kaj kvalita agado en tiu tereno.

Ĉe la paĝaro de REJM <www.tejo.org/rejm> aperis bona inform-paĝo pri OkSEJT-43, kian ni havis tute ne ĉiujare. Aperis ankaŭ specialaj paĝoj pri nia tre probabla IJK, kies okazigon en Rusio TEJO ne jam findecidis. La paĝoj jam enhavas mapojn de la regiono, fotojn de la ripozejo "Berjozka", proksimumajn prezojn de loĝado ks. Paĝoj pri IJK-60

[1] "Novaĵoj de Esperanto-movado" aŭ (la dua nomo) "Esperanto novosti" (E-novaĵoj).

[2] <www.yahoogroups.com> – usona servilo, kiu ebligas funkciadon de retpoŝtaj diskutgrupoj. Tre populara inter retemaj esperantistoj.

konkurencas pri la nomo “la plej populara parto de REJM-paĝaro” kun nia kolekto de poŝtelefonaj melodioj, kiujn kodigas Aleksej Kuznecov (Kostroma). Jam aperis en la kolekto preskaŭ ĉiuj “Oraj Kantoj”, “La Bamba”, himno “La Espero” ka., kio iĝis bona logaĵo por plej internacia publiko.

Malgraŭ konstanta kvanta kaj kvalita kresko de esperantlingva Interreto, ankoraŭ estas bezonataj pliaj fortoj por ĉi agado. Plej unue temas pri aŭtoroj kaj tradukantoj, due – pri profesiecaj ret-programistoj kaj aspektigistoj.

> La retpaĝo <home.no.net/verdulo/no/birdsounds3.htm> prezentas Esperantajn nomojn de 109 eŭropaj birdoj kune kun surbendigo de ilia kanto en mp3-formato. La birdojn surbendigis Juhani Kyrro k.a. (vidu <www.virtual-bird.com>), kaj la retpaĝon esperantigis Claude Rouget <claude.rouget@start.no>. (***el “NUN”***)

Se vi havas E-rilatajn ruslingvajn informojn por disvastigi, sendu ilin al <novosti@ikso.net> (aŭ paperpoŝte: 191014 Sankt-Peterburg, Baskov per. 13/15 – 15, Ivanov Vjaĉeslav). Se viaj novaĵoj estas en Esperanto (ankaŭ pri la ekster-Esperanta vivo en Rusio), sendu ilin al <gxangalo@gxangalo.com>.

ĝis revido, via <www.ikso.net/~slavik>

REVU

Karaj geamikoj! Ni plezure informas vin, ke nun naskiĝas la unua numero de junulara arta revueto “REVU”. Se vi nur provas verki en Esperanto, tio estas via ŝanco publikigi viajn verkojn kaj ricevi konsilojn de spertaj E-aŭtoroj kaj opinion de viaj geamikoj! Tio estas via ŝanco ekkreski! Se vi estas jam sperta juna verkisto, ni ankaŭ bonvenigas viajn verkojn sur paĝojn de nia revueto!

Do sendu al ni viajn originalajn kaj tradukitajn **versaĵojn**, **prozaĵojn** kaj **kantojn** (prefere kun akordoj). Kluboj, sendu **scenarojn de teatraĵoj** – kiujn vi montras (-is) dum E-aranĝoj kaj klubaj kunvenoj! Ne forĵetu scenarojn, sed pere de publikigo dividu ilin kun aliaj kluboj – tiam viaj teatraĵoj, eble, iĝos konataj ankaŭ en iliaj urboj! **Aŭtoroj de la plej altkvalitaj verkoj ricevos premiojn!**

Artemuloj, ni bonvenigas viajn **artikolojn** kaj **recenzojn** (pri muziko, literaturo, kino, dancoj, kulturo ĝenerale ks.)! Kaj – speciala rubriko por legamantoj – **“Mi konsilas legi…”**! Skribu pri iu libro, kiu plaĉis al vi (ne gravas, ĉu tio estas libro en Esperanto, en la rusa aŭ en iu alia lingvo) kaj eldiru viajn impresojn, por ke viaj geamikoj eksciu pri ekzisto de tia bela kaj vere leginda libro!

Se vi pretas helpi pri desegnado, teknika kaj krea laboro dum preparado de la revueto – ni invitas vin al nia “redakcio”! Vere bezonata estas helpo pri kolektado de verkoj. Se vi scias, ke iu el viaj geamikoj verkas en Esperanto, bonvolu helpi al li aperigi siajn artaĵojn en nia revueto.

Kontaktu nin rete <sony@mail.icomtex.ru>, aŭ poŝte – 153051 Ivanovo, Koĥomskoje ŝosse 22A – 69, Sonjo Ŝejnina.

arteme kaj kunlaboreme via Redakcio de “REVU”

Policisto haltigas aŭton, kie sidas blondulino, pro tio ke ŝi veturis tro rapide.

– Bonvolu montri vian stir-rajtigilon.

– Damne, knaboj, vi tamen iel ordigu viajn aferojn! Hieraŭ vi forprenis mian rajtigilon, kaj jam hodiaŭ volas, ke mi montru ĝin al vi!

(esperanto-anekdotoj)

Eksciu, ke...

ANATOLO GONĈAROV TRANSLOĜIĜIS

Mi finfine firme instaliĝis en la pitoreska Sajan-montaro. En mia du-(fakte tri-)ĉambra loĝejo estas ebleco loĝi triope. Ni jam estas du: krom mi estas esperantisto el Odessa (el mia plej unua E-kurso) Eŭgeno Perepelica. Ni serĉas trian pensian esperantiston por la kunloĝo E-parolante, por-E-laborante. La legomparcelo ebligos provizi por la tuta jaro legomojn, parte ŝparigante niajn pensiojn por aliaj aferoj, ekz. E-aranĝoj. Dezirindus legi aliĝan leteron de eks-SEJM-ano, kiu estas konata al mi. Nia loĝejo havas preskaŭ ĉiujn urbajn komfortaĵojn krom la necesejo (kiu enkortas). Krome ĝi estas tre varma, troviĝante hejt-sisteme inter la hejtejo kaj malsanulejo, kiuj ambaŭ proksimas. Ni havas komputilon, printilon kaj skanilon... Skribu al: Anatolo Gonĉarov, ul.Festivaljnaja 15 – 1, Artjomovsk, 662951 Krasnojarskij kraj; aŭ rete: <anatolog@mal.ru>.

Anatolo Gonĉarov (Artjomovsk)

KONATIĜU KUN E-LECIONOJ DE EŬGENO PEREVERTAJLO

Iam en la revuo "Soveta Uzbekistano" (aperinta en 11 lingvoj – persa, daria, uzbeka, franca, germana, rusa, araba, hispana, angla, hindia, uzbeka per araba literaro) ekzistis Esperanta rubriko, kiu enhavis E-novaĵojn, landajn novaĵetojn kaj ampleksajn E-lecionojn. Jen estas citaĵoj el la leteroj de la legantoj pri la E-paĝo kaj lecionoj. "Hispanaj esperantistoj revas pri E-kurso en iu landa, hispania nacilingva gazeto. Ni ne havas tian kurson. Dankon al vi!" (Adonis Meana, Hispanio). "Via kurso en la araba lingvo helpas al miaj lernantoj studi Esperanton kaj kompreni la vortojn sen la franca" (Mhamed Bettahar, Alĝerio). "Mi havas multajn lernolibrojn de E-o, sed nenie mi renkontis la similajn lecionojn kun tiom originala instrumetodo" (Hans Dietrich, Germanio). "La ideo havi E-paĝon en via revuo estas genia. Genia pro tio, ĉar la revuo estas eldonata plurlingve kaj per tio draŝas multajn muŝojn per unu frapo" (Ludvig Gross, Germanio). "Mi studis la prezentitajn 4 lecionojn kaj povas konstati, ke la metodiko de la instruado estas bona, ĉar ĝi estas simpla kaj facile komprenebla al reprezentantoj de multaj nacioj. Tiun metodikon uzis ankaŭ la hungara fakulo d-ro I.Szerdahelyi" (Laimundas Abromas, Litovio). "La ŝablonoj (stereotipoj) estas genia elpensaĵo. Mi rekomendos la lecionojn al la Brita E-Asocio" (David Curtis, Anglio). "Gratulojn pri via nova iniciato. Mi esperas ricevadi estontece pluajn viajn kopiojn" (Humphrey Tonkin, Usono).

Nun tiuj lecionoj estas ĝisdatigitaj, ili estas plenigitaj per multnombraj ekzercoj, dialogoj, detalaj reguloj kun multaj ekzemploj ktp. Pere de la lernolibro, de la ekzercoj la studanto estas laborigata, paroligata ekde la unua leciono. La kantoj ŝatataj de esperantistoj el multaj landoj vigligas la lecionojn. Demandu la lecionojn de mi, t.e. de la iama rubrikestro. La adreso estas Esperanto-Centro, p/k 140, Poĉtamt, 700000 Taŝkento, Uzbekistan; rete <esperuzo@mail.ru>, <eugeny@gimli.com>.

Eŭgeno Perevertajlo (Uzbekio)

LA UNUA ESPERANTO-SOCIETO RESTIS SEN EJO

La 31-an de marto rezulte de juĝproceso kontraŭ Komitato pri Ŝtataj Nemoveblaĵoj (KUGI) de Sankt-Peterburgo la unua en historio de Esperanto registrita societo de esper-antistoj "Espero" restis sen ejo. Laŭ la nova politiko de la urba estraro sociaj organizaĵoj ne plu ricevados ejojn en historia centro de la urbo, eĉ se temas pri kulture kaj socie valoraj so-

cietoj. Oni ne jam proponis alian ejon, almenaŭ en apudurbo, por la mondfama E-klubo.

La societo de esperantistoj "Espero" estis fondita en 1892 kaj per tio iĝis la unua oficiale registrita Esperanto-klubo en la mondo. Antaŭ la Oktobra Revolucio en Rusio la societo okupis sufiĉe grandan sidejon en la strato, kiu nomiĝas nun strato Marata. Dum post-stalinisma epoko kaj ĝis la disfalo de Sovetunio "Espero" ekzistis kiel klubo ĉe Kulturpalaco "Kirov". En 1991 grupo de lokaj aktivuloj sukcesis restarigi la societon kaj, dank' al sindona laboro de Anna Butkeviĉ, ricevi por ĝi duĉambran ejon en centra parto de la urbo. Post paso de 12 jaroj la ejo estas reprenata de la ŝtato.

La kazo de "Espero" ne estas la sola en aro de similaj konfliktoj pri nemoveblaĵoj en la antaŭjubilea Sankt-Peterburgo. Kelkaj aliaj societoj kaj kluboj ricevis similajn sciigojn de KUGI pri ĝia decido ne plu luigi ejojn al tiuj organizaĵoj. La liberigata nemoveblaĵo estos vendata dum la prezoj altiĝas lige kun baldaŭ festota 300-jariĝo de la urbo.

Malgraŭ malsukceso dum la juĝproceso, prezidanto de "Espero" Anna Butkeviĉ ne volas cedi al tio, kion ŝi nomas "arbitro de lokaj potenculoj". Ŝi planas turni sin al juĝejo de la plej alta nivelo kaj procesi kontraŭ Peterburga KUGI en Moskvo. Subtenleterojn kaj informpetojn sendu al Anna Butkeviĉ (retpoŝte <espe@narod.ru>, telefone/fakse (812) 2344759).

Sl. Ivanov (Peterburgo)

FI EN ĈEBO

La 05-06-an de aprilo en Ĉeboksari pasis la 4-a Festivalo de Interesoj. Ĝi konsistis el du partoj: la unua pasis la 05-an de aprilo, kiam okazis majstro-klasoj por aktivuloj de junularaj organizaĵoj pri diversaj aspektoj de funkciado de organizaĵo; la dua parto, la 06-an, estis mem Festivalo – entute pasis prezentoj de 38 junularaj kaj infanaj organizaĵoj de Ĉuvaŝio kaj ankaŭ de najbaraj regionoj (estis gastoj el Joŝkar-Ola kaj Kazanj). Nia JEAĈR ankaŭ aktive partoprenis en la Festivalo kaj i.a. ricevis diplomon pro bone preparita prezento. ***(JEAĈR)***

JUNULARA KURSO EN PETERBURGO

En Peterburga Societo "Espero" sukcese pasis unumonata rektmetoda kurso de Esperanto por junularo. La kurson gvidis speciale invitita el Litovio juna instruisto Eŭgeno Gaus, jam konata al rusianoj dank' al sia partopreno en REK-EoLA (Serovo, 2001).

Eĉ laŭ siaj statistikaĵoj la kurso en Peterburgo iĝis tre nekutima – ja ĝin finis pli multe da homoj, ol estis komence de la studado. En la unua leciono ĉeestis 24 lernantoj, en la lasta – 33. La lernantoj rakontadis pri la gajaj lecionoj al siaj amikoj, kaj tiuj venadis al la kursejo. Ĉio finiĝis per banala manko de seĝoj en la ejo de Societo "Espero"! Dank' al la kurso centoj da gejunuloj aŭdis pri Esperanto, ĉar aperis multaj anoncoj en diversaj lernejoj kaj kvalita reklamo en la januara numero de tre populara studenta gazeto "Gaudeamus" (ĝin fakte legas ĉiuj studentoj de la urbego).

Fine de februaro Eŭgeno revenis al Litovio. Liaj lernantoj nun renkontiĝas ĉiusabate en la ejo de Societo "Espero" ĉe la metrostacio "Petrogradskaja". La kunvenoj okazas inter la 6-a kaj 9-a horo vespere – ĉiuj esperantistaj gastoj de la urbo estas varme bonvenaj.



unu el la feliĉuloj kun "Brile" por la fina ekzameno

La sukcesan kurson organizis grupo de junaj E-aktivistoj: Oksana Burkina, Slavik Ivanov, Nastja Koĵevnikova, Anna Lisina kaj Aleksandr Osokin. Ĉiamaniere subtenis la kurson prezidanto de la Societo "Espero" Anna Butkeviĉ. Universala


leciono la 14-an de februaro

Esperanto-Asocio helpis per iom da mono, kiu suficîs por kovri la vojaĝkostojn de la instruisto kaj pagi al li salajron; de UEA venis ankaŭ multaj malnovaj numeroj de “Kontakto” kaj “Esperanto”. REU provizis nin per kelkdek ekzempleroj de “REGo”, de “Sezonoj” venis pakaĵo kun diversaj numeroj de “La Ondo de Esperanto”. REJM vendis kelkajn ekzemplerojn de Bokarev-vortaro kontraŭ speciale rabatita prezo.

Ĉiu kursfininto ricevis Esperanto-rusan vortaron (estis diversaj eldonoj, kaj pro tio okazis lotumado), kelkajn E-periodaĵojn kaj belan ateston. Eblas kredi, ke la novaj homoj helpos pliviglligi la Esperanto-movadon en Sankt-Peterburgo. Oni jam, interalie, planas organizi en Peterburgo antaŭkongreson de IJK-60 en 2004, estas ankaŭ aliaj projektoj: malgranda lingva festivalo, kunagado kun aliaj junularaj societoj, informa kaj eldona laboro.

Sl.Ivanov (Peterburgo)

INVITO AL TRI ĈINAJ KONGRESOJ

Kongresoj: ***La 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto; La 22-a Komuna Seminario de Ĉinaj, Japanaj kaj Koreaj Junuloj; La 1-a Internacia Esperanto-Turisma Festivalo de Ĉinio.*** **Loko:** Yanji, Ĵilin Provinco, Ĉinio. **Datoj:** 15-18 aŭgusto 2003. **Kongresejo:** Yanbian Instruista Universitato. **Programoj:** Riĉaj programeroj; prelegoj, seminario, naciaj dancoj, turismaĵoj, ktp. **Aliĝkotizo:** 50 dolaroj (inkluzivas transporton inter hotelo kaj kongresejo kaj bankedon). **Loĝado:** Studenta loĝdomo(5 dolaroj por 1 nokto; manĝaĵo – 5 dolaroj por 1 tago); Hoteloj (30-50 dolaroj por 1 nokto; manĝaĵo – 20 dolaroj por 1 tago).

18-20-an de aŭgusto 2003 okazos ekskursoj al Ĉangbai Montaro, la limo inter Ĉinio kaj Koreio; Hunĉun, la landlimo de Ĉinio, Rusio kaj Norda Koreio; Raĵin, Sunbong, Norda Koreio; Haishenwei, Rusio. Por pli da informo, kontaktu: s-ro Li Jundao <Jundao21@yahoo.com.cn>, poŝta adreso: 51-2-11 xinhua str., Yanji, Jilin prov., China; tel: (86-433) 2911980; fakso: (86-433) 2663360; aŭ d-ro Bak Giwan <Bakgiwan@yahoo.co.kr>

NOVA E-KLUBO EN ĈEBOKSARI

Mi ŝatus informi ke la 9-an de aprilo en Ĉeboksari aperis nova junulara Esperanto-klubo “Edmond Privat”. La klubon konsistigis kursfinintoj de Danil Kapitonov kaj lernantoj de Aleksandr Blinov. La fondan kunvenon gvidis Aleksandr Blinov, Danil Kapitonov kaj Aleksandra Fedotova. En la fonda kunveno ĉeestis 12 personoj. Estis priparolitaj bazaj principoj de la kluba agado: lingva disciplino dum kunvenoj (paroli en facila Esperanto), nova kunvengvidanto ĉiufoje, lingvaj ludoj, aktiva partopreno en kluba vivo, ĉeftemoj ĉiukunvene. Oni parolis pri eventuala helpo al JEAĈR pri organizo de ĉefaj aranĝoj, kaj oni pensis pri la ebleco fari novajn poresperantajn kaj porsociajn aktivaĵojn. Dume ne estis trovita konstanta loko de kunvenoj, tamen estis decidite ke la kunvenoj okazos dusemajne. Kio estis agrabla – entuziasmo ne mankis! Estis decidite ke la klubo ekzistos ĉ. 3 jarojn (aŭ precize 1001 tagojn), post kio ĝi malfondiĝu kaj ĉe deziro povas aperi nova klubo.

Aleksandr Blinov (Ĉeboksari)

Grigorij Arosev (Moskvo)

INTERESIĜO PRI LA MORGAŬA TAGO

Hodiaŭ pliboniĝis la humor'
sen vera kaŭz' (pli ĝuste – sen kialo).
Ekŝajnis: ne sensencas mia jor',
ekŝajnis: venkis venton mia alo,
ekŝajnis: mi ne plu faladas sor,
kaj post malviv' finfine venis malo.

Hodiaŭ ne satdormis l' organism',
sed l' korpo ne laciĝas (vera strango:
ĉi tion mi eĉ povus nomi skism',
se malsanece ruĝus mia vango,
sed viglas mi). Ĉu hantis optimism'?
Aŭ tamen antaŭtempe kantas lango?

Hodiaŭ sidas mi en trolebus'
kun nura cel': ĉi tiujn vortojn noti.
Elfluos baldaŭ la malvarma pus',
tre baldaŭ ĉesos botoj neĝe koti,
verŝajne, amikiĝos kat' kaj mus',
kaj suno maldecidos nin bojkoti.

Hodiaŭ mi decidis kun obstin',
ke tempas surfaciĝi de la fundo,
ke venos la komenco al latin',
ke ne ekzistas senta troabundo.
Renkontos hejme min la amatin',
kaj gaje diros: "Kara, foras lundo!"

Hodiaŭ min atakis multa mon',
ne gravas, ke mi ŝuldas pli, ol havas,
kaj granda sum' celatas por redon'.
Mi ĉi-momente riĉas, sekve bravas.
Sed se vi min regalus per admon',
mi laŭdus vin: "Karul'! Vi ege pravas!"

Hodiaŭ pliboniĝis la humor'.
Mi ne deziras plu splitadi haron.
Bonege estus, se la nuna hor'
pli longe fluus, ol la ĵusa jaro.
Sed eĉ se ne – mi ĝojas, ĉar tuj for-
martiĝos invalido-februaro.

Hodiaŭ frapis nazon vigla gut',
rastante rustan reston de la gripo.
Germano diras: "Ja, dast ist sehr gut!"
"Tré bien!", – aŭdiĝas de la francaj lipoj.
Mi legas geniulon Vonnegut.
Li diras: "Very well!" per siaj tipoj.

Hodiaŭ la amiko de l' marbord'
al mi direktis kelkajn bonajn frazojn.
En ili mankis alta senc' kaj ord'
(nu, tamen li korekte uzas kazojn),
sed tio estis kvazaŭ je la pord'
frap-frapis bon'. Mi ŝatas ĉi okazojn.

Hodiaŭ elpensiĝis la titol'
de ĉi poemo antaŭ mem poemo.
Mi taksas tion ŝerco aŭ petol'
de mia nebridebla versaĵemo.
Perdiĝis la ŝlosilo de skatol'
de ligo inter senc', enhav' kaj temo.

Hodiaŭ pliboniĝis la humor'.
Mi preĝis, kaj ĉi preĝo ekstermesa
tre helpis peli ombrojn de stupor',
fantomojn de la viv' kondamne stresa,
kaj mi esperas, mi voĉdonas por
ke l' sekva tago estu interesa.

28.02.2003, Moskva

La 15-an de aprilo Maŝa Koĉetkova (kiun ni ĉiuj konas kaj amas) naskis la filinon Anja. Gratulojn! ***(Esperanto-rus-informoj)***

En februaro-marto en la reta diskutgrupo <kreado> okazis diskuto pri t.n. "abortaj" rimoj. Ĝi komenciĝis, kiam Valentin Melnikov, kritikante senditan al la grupo tradukon, skribis "'bela-karuselo' estas t.n. aborta rimo, oni jam multe skribis pri evitindo de tiu rim-speco". Post tiuj vortoj ekflamis la diskuto, la plej interesajn partojn de kiu vi trovos ĉi tie.

RIMOJ BONAJ KAJ MALBONAJ

"*aborta rimo* (ĉe kiu la postakcentaj sonoj ne samas, ekz.: mordas – pordon)" – ***PIV***

Pavel Moĵajev (Ukrainio)

Jes, mi aŭdis pri tio. Eble tiu mia misrimemo estas nur "infana malsano" de esperantisteco, sed al mi ŝajnas (mi serioze okupiĝis pri poetiko en la rusa lingvo), ke tiu ĝustemo pri rimoj en Esperanto prirabas ĝiajn eĉ sen tio iom limigitajn kompare kun la naciaj lingvoj poetikajn eblecojn (temas pure pri teknika rimado – ja en E-o, ekzemple, ne eblas rimi verbon kun plural-akuzativa substantivo ktp). Konsiderante ĉion mi tamen provas min pravigi per tio, ke "bela-karuselo" estas ne la plej monstra rimo en E-o.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

La malestima esprimo "aborta rimo" devenas de Kalocsay, kaj neado de poezia valoro de radikaj rimoj estas lia persona opinio. Verdire, "rimo" estas sufiĉe vasta nocio kaj signifas simetrion inter du (aŭ kelkaj) versoj. Simetrio povas esti diversspeca, kaj ĝi povas ekzisti nur inter akcentitaj radikoj sen koincido de finaĵoj (same, kiel ĝi povas ekzisti inter unuaj silaboj de versoj!). Tial, en si mem, aplikado de radikaj rimoj ne estas "peko" antaŭ la poezio, nur antaŭ la poeziaj gustoj de Kalocsay, kio ne estas samo.

> Dum tri semajnoj fine de marto – komence de aprilo en respublika biblioteko en Ĉeboksari funkciis ekspozicio de Esperanto literaturo. Estis prezentitaj la libroj el biblioteko de JEAĈR, kiu nun konsistas el pli ol 150 libroj, kaj multe da revuoj. ***(JEAĈR)***

Manfred Retzlaff (Germanio)

Ankaŭ mi havas la impreson, ke tiu neperfekta rimvortparo estus evitinda, kvankam ambaŭ rimvortoj nur diferencas per la lasta vokalo "a" respektive "o". Ŝajnas al mi, ke precipe rusaj esperantistoj uzis aŭ uzas tiun rimado-manieron. La kaŭzo eble estas, ke en la rusa lingvo la finaj vokaloj estas nur malforte elparolataj, tiel ke oni ne rimarkas iun diferencon. Kaj la vortfinaj vokaloj "o" kaj "a" eĉ sonas tute same en la rusa lingvo, se mi ne eraras. Estas iu vokalo inter a kaj o. (En mia iama lernolibro de la rusa estis uzata speciala signo (inversa a) por esprimi tion per la literoj de la Internacia Sonskribo.) Sed en aliaj lingvoj, precipe ankaŭ en Esperanto oni rimarkas la diferencon. Kaj tio povas esti sentata iom ĝena.

Rimvortoj ja sonu same ekde la vokalo de la akcentata silabo, antaŭe de ĝi – malsame.

Samideano Mevo ankaŭ opinias, ke tia "ĝustemo" prirabas Esperanton je poetikaj eblecoj. Sed pli limiga ŝajnas al mi la "kondamno" de la rimado per samsufiksaj vortoj (la t.n. adismaj aŭ "adasismaj" rimoj), kiujn Zamenhofo kaj aliaj fruaj Esperanto-poetoj senhezite uzis. La rekta konsekvenco de tiu kvazaŭa malpermeso ŝajnas al mi, ke oni devas serĉi aliajn rimedojn de rimado – se oni entute volas rimi. Kaj unu ebleco estas la rimado per neperfektaj aŭ preskaŭ-rimoj (aŭ "rimoidoj" laŭ la "Parnasa Gvidlibro") kiel la supre menciita. Aŭ la Esperanto-poetoj inventas novajn vortojn, neologismojn aŭ malofte aŭ nur en poezio uzatajn vortojn, kiujn ordinaraj esperantistoj ne komprenas. Mi pensas, ke Esperanto estas esence sufiksa lingvo, en kiu tiaj sufiksaj vortoj kaj ankaŭ samsufiksaj rimoj sonas tute naturaj kaj ne ĝenaj. Estas tio eble mia ne tre kompetenta opinio. Sed mi konas plurajn spertajn esperantistojn, kiuj samopinias, kiujn ne ĝenas tia rimado, kondiĉe, kompreneble, ke oni ne troigas la aferon, rimante nur pere de la sufikso -ad- (pro tio certe ankaŭ la esprimo "adasismo").

Laŭ germana dirmaniero mi emas diri, ke "oni elŝutis la infanon kun la ban-akvo". Tio signifas ĉi-rilate, ke oni kvazaŭ "anatemis" aŭ tabuigis la tutan samsufiksan rimadon – ankaŭ per la sufiksoj -ig-, -iĝ-, -an-, -ar-, -et-, -eg-, -ant-, -int-, -ont-, -at-, -it-, -ot- kaj tiel plu anstataŭ nur malkonsili la rimadon per la sufikso -ad- (-ado, -adi, -adas, -ada ...). (Sed ŝajnas al mi tro enradikiĝinta tiu abomeno de la t.n. "adasismoj" (mi ne ŝatas tiun malestiman esprimon) en la kapoj de en poezio gvidaj esperantistoj, ol ke oni facile povas konvinki ilin kaj iliajn adeptojn pri la neneceso aŭ netaŭgeco de tia malkonsilo kaj fakta malpermeso.)

Cetere, Zamenhof uzis almenaŭ unufoje ankaŭ tian malprecizan rimon, nome la rimvortparon (karan – altaron) en la poemo "Mia penso", en la tria strofo. Mi enkopias ĝin ĉisube:

Mia penso kaj turmento
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan,
La junecon – mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

Eble Zamenhof estus povinta eviti tion per ŝanĝo de la komenca pronomo "kion" al "kiun" aŭ "kian" kaj anstataŭigante la riman vorton "karan" per "karon". La kvina linio de tiu strofo tekstus tiam: "Kiun havis mi plej karon," aŭ "Kian havis mi plej karon,". Kaj tiam ni havus la "puran" rimvortparon "karon – altaron". Eble vi povos diri al mi, ĉu tia ŝanĝo estus ebla.

<u>Valentin Melnikov (Moskvo)</u>

Manfred jam prave atentigis, ke en la rusa senakcentaj "a" kaj "o" sonas tute same. El tio rezultas, ke rusoj (kaj nur ili), dum ili ne posedas Esperanton tute libere, ne sentas maltaŭgecon de rimo kiel "bela – karuselo". Ja en Esperanto la tuta gramatiko "sidas" en finaĵoj, do senakcentaj "a" kaj "o" neniel mikseblas.

Ĉiu lingvo havas siajn leĝojn – kiuj eĉ iom-post-iom ŝanĝiĝas. Apliki al Esperanto leĝojn de la rusa estas same, kiel veturi per trajno, uzante horaron de busoj.

Ju pli bone vi posedas E-on – des pli facile trovos rimojn.

<u>Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)</u>

Kelkdek spertaj E-poetoj pledas pri poezio entute senrima, sed eĉ plenpantalone estimante ilin, mi faros miajn poemojn, kiel mi kutimas fari ilin. La tempo juĝos. La samo koncernas "abortan" rimon. Mi iam verkis la artikolon pri la temo, do mi nur ripetu, ke ne ekzistas (laŭ mi, certe) aborta rimo. Ekzista bela rimo kaj malbela. Kaj ekzistas aborta opinio pri ekzisto de "aborta" rimo.

Poeto afrika, germana, rusa – ne gravas – tiu, kiu prudente enportas riĉaĵon de sia lingvo en E-poezion, sendube riĉigas la lastan. Brodskij verkis en la angla portante tien multon el la rusa ĉarmo!

<u>Manfred Retzlaff (Germanio)</u>

Eble ni ne uzu plu la vorton "aborta rimo"; ĉar ĝi impresas iom moka kaj malestima, kvankam ĝi troviĝas en PIV. Mi do proponas uzi estonte nur la esprimon "rimoido", kiu estas difinita en PIV jene: "rimo, en kiu la postakcentaj konsonantoj similas, sed ne samas (ekzemple: vorto – pordo)".

Eble oni povas tiun vorton uzi ankaŭ por la rimoj, en kiuj nur la finaj aŭ postakcentaj vokaloj de la rim-finaĵoj malsamas, kiel en la ekzemploj "bela – karuselo" aŭ "brila –

veturilo”. Aŭ oni uzu tiun nocion ĝenerale en ĉiuj kazoj, en kiuj la postakcentaj son-elementoj parte aŭ tute malsamas. Eble oni nomu tiajn rimojn ankaŭ “neperfektaj”. Perfekta estas iu rimo tiam, se ĝi plenumas la PIV-an difinon de la nocio “rimo”: “Samsoneco, inter du aŭ pluraj vortoj, de la akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj son-elementoj”. (Oni eble povus diri ankaŭ: “Samsoneco, ... , ekde la akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj son-elementoj”.)

Estas nun la demando, ĉu oni rajtas uzi tiajn ne-perfektajn rimojn aŭ ne, aŭ ĉu nur esceptakaze, licenca-kaze. Mi pledas por tio, ke oni lasu al ĉiu poeto aŭ tradukanto de poemoj la liberan decidon tiurilate. Oni ja ne povas malpermesi iun manieron de rimado, nur konsili ion. Decidu la legantoj. Ili aprezu aŭ ne aprezu.

Por mi mem mi diru, ke plaĉas al mi pli la “puraj”, en tiu senco “perfektaj” rimoj. Kaj mi mem ankaŭ volas plejeble uzi nur tiujn, kiuj plene kongruas al la supre menciita difino de rimo.

Nikolao Gudskov (Moskvo)

Interese, tamen: ĉu “nepuraj” rimoj, estu ili eĉ “abortaj” laŭ fiesprimo de Kalocsay, malplibonas ol tuta manko de rimoj? Jen, la rusaj esperantistoj “pekas” pri tio, sed ĉu tiuj senrimaj kaj senritmaj “poemoj”, per kiuj nin provizas hispanaj kaj italaj esp-istoj, estas pli poeziaj? Estas strange, sed la kritikemuloj ŝatas kritiki tekstojn, kie la rimoj almenaŭ estas, sed ne tuŝas tiujn, kie ili plene forestas! Laŭ mi – maljuste!

Blazio Wacha (Hungario)

… oni do ne diru, ke abortaj rimoj estas malbonaj. Oni nur konsciu, ke abortaj rimoj kelkfoje, se legataj de rusoj aŭ bulgaroj (...), ŝajnas pli efektaj, ol se legataj de ne-rusoj, pro (konsiderinda aŭ ioma) redukto de la diferenco (opozicio) de la sonoj “o” kaj “a” fare de rusoj, kaj pro “plenbuŝa” konservo (aŭ ĉu pliigo?) de la opozicio fare de iuj aliaj, ekz. hungaroj.

Abortaj rimoj povas efiki ankaŭ iel streĉe, interese, simile ekzemple al trakuraj rimoj (turo – kuros, stelo – ŝtelos ks.). Simile, kiel mi diru, kelkfoje estas amuze, se aperas io rimeca en loko nesupozata porrima.

Manfred Retzlaff (Germanio)

Responde al la ĉi-rilata sciigo de samlistano Wacha Balasz mi emas diri, ke rimvort-paroj kiel “turo – kuros”, “stelo – ŝtelos” tute ne plaĉas al mi. Min impresas tiuj, kvazaŭ iu volis rimi sed ne povis. Sed tio estas nur mia propra opinio. Tamen mi pledas por tio, ke oni uzu prefere nur “verajn rimojn” – laŭ la difino de nocio “rimo” en PIV. Aŭ oni tute rezignu pri rimoj. (Alternative oni ja povus verki versojn nur laŭ iu fiksa sekvo de akcentataj kaj neakcentataj silaboj.) Laŭ mia sento nur rimvort-paroj kiel “turo – kuro”, “stelo – ŝtelo” – sen aldona fina konsonanto ĉe unu elemento – estas agrable sonantaj rimoj.

Sed eble mi estas – estante germanlingvano – tiurilate iom influita de la germana poezio, en kiu tiaj neperfektaj aŭ “abortaj rimoj” (laŭ Kaloĉajo, kiel en la PIV-a ekzemplo “mordas – pordon”) apenaŭ aperas. Mi emas diri laŭ germana esprim-maniero iom ŝerce: “Das geht mir gegen den Strich” (tio signifas: mi ne ŝatas tion kiel kato, kies felo-harojn oni brosas kuspe, kontraŭ la normala direkto). Eble alilingvanoj ne havas tian impreson.

Rilate la originan demandon de la esperantisto Mevo kaj la de li uzitan rimvortparon “karuselo – bela” mi emas ankoraŭ komenti, ke en la rusa lingvo simila rimvortparo kiel ekzemple “это – света” (latinlitere skribite: eto – svjeta = tio – de la lumo) prezentas veran rimon laŭ la PIV-a difino; ĉar la finaj vokaloj “o” respektive “a” en la rusa sonas tute egale. Ili estas nur skribataj malsame. Sed kontraŭe en Esperanto kaj ekzemple ankaŭ en la itala lingvo, kiu havas simile klaran sonsistemon, la vokaloj “a” kaj “o” estas klare distingataj,

ankaŭ parole. (Cetere, mi devis pro mia nur rudimenta scio de la rusa lingvo longe pripensi kaj serĉi en mia rusa-germana vortaro, ĝis mi trovis tiun simplan ekzemplon.)

Valentin Melnikov (Moskvo)

Abortajn rimojn uzas NUR RUSOJ. Kaj feliĉe, la uzado dum lastaj jardekoj maloftiĝis – tiel, ke ŝajne s-ro Bruna Ŝtono iĝis la lasta ties adepto inter pli-malpli konataj poetoj.

Unusola neruso, uzinta tiajn misrimojn, estas H.Adamson – tamen: 1) li estis estono, do ofte aŭdis la rusan lingvon; 2) eĉ li uzis tion nur esceptokaze; kaj 3) post tio pasis pli ol duonjarcento.

Mikaelo Povorin (Moskvo)

… pri la aborta rimo mi delonge volas diri kelkajn vortojn. Mi estas ruso, alkutimiĝinta al tiu rimo. Sed ekde kiam mi esperantiĝis, miaj oreloj estas dorlotitaj per pli bonkvalitaj rimoj. Eĉ pli, la aborta rimo nun malagrable impresas mian aŭdon, ankaŭ en la rusa. (Interalie, ne nur tio impresas min malagrable, sed, ho miraklo, ankaŭ la manko de la artikolo en la rusa! Ne nur la rusa influas la posedon de Esperanto, ankaŭ Esperanto influas la posedon de la rusa.) Jes, mi konsentas, ke la termino "aborta" estas sufiĉe moka. Sed mian nacian fieron tio tute ne ofendas. La termino delonge ŝajnas al mi evidente komune akceptita, eĉ ne gravas, ĉu PIV mencias ĝin aŭ ne.

Tiun rimospecon mi opinias evitinda, sed ĝi povas helpi transdoni la specifecon de, ekzemple, amatoraj rusaj kantoj, kie ĝi ofte abundas. Tamen nenio malhelpas, tradukante ilin, eĉ tiuokaze ne uzi abortajn rimojn. Konservi ilin ne tre gravas, pli gravas, ke la rezulto estu agrabla por reprezentantoj de ĉiuj popoloj. La specifecon eblas kaj, laŭ mi, preferindas, transdoni per aliaj rimedoj. Kaj sen abortaj rimoj la traduko estos eĉ pli bona ol la originalo. Tio sufiĉe ofte okazas, kaj tio nemalbonas, almenaŭ laŭ mia modesta opinio.

Kaj ankoraŭ jen kion. Diversajn specojn de rimoj oni perceptas, verŝajne, en diversaj niveloj. "Homo" – "domajn" laŭ mi estas rimo nur pro tio, ke tiun fakton eblas kompreni, analizante la radikojn. Tiel perceptas la abortajn rimojn nerusoj. Sed por mi, ruso, rimoj kiel "mirinda" – "plenda" estas same strangaj, kiel por ili la abortaj. Ankaŭ mi, analizante, vidas, ke la senankcentaj "nda" en tiuj vortoj tute koincidas. Sed aŭdi tion kiel rimon senpere, sen analizo, por mi estas malfacile, ĉar ne koincidas la akcentaj vokaloj. Tamen ĉu bonan rimon oni devas kompreni post analizo aŭ rimarki tuj, preskaŭ nur sense? La respondo, verŝajne, estas ne tute evidenta. Pro tio oni ĉiam diskutas pri rimoj.

Don Harlow (Usono)

Mi iom malfrue eniras ĉi tiun diskuton, sed volas fari iun komenton (eble pleonasman) pri "abortaj rimoj".

La "aborta rimo" aperas ĉefe ĉe slavaj (ĉefe rusaj) esperantistoj. Laŭ mia kompreno, temas pri la fakto, ke en la rusa lingvo la postakcentaj vokaloj estas mutigitaj kaj ne havas sian plenan valoron; do oni rajtas uzi tiajn malsamaspektajn (sed parole pli-malpli samsonajn) finaĵojn kiel rimojn. En Esperanto, male, oni devas klare doni la kvalitojn de ĉiuj vokaloj, eĉ la postakcentaj; kaj sekve tiuj respondaj silaboj vere ne estas rimoj. (Tial la nomo "aborta rimo" – la rimo komence aperas, plenkvalite, sur la akcenthava silabo, sed poste nuliĝas sur la postakcentaj silaboj – efektive, la rimo abortis.)

Mi ne intencas (pardonu min Valentin) definitive senrajtigi la "abortajn rimojn" en la Esperanta poezio – ili jam faris por si ian lokon (apud la adasismoj, kiuj ankaŭ oftas, kaj apud la konstanta rimado sur pronomoj, kiujn ankaŭ mi emas fari). Sed ili vere ne estas veraj rimoj, kaj funkcias plej bone, kiam oni mise elparolas la finajn vokalojn kiel mutaĵojn.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Al la viktimoj de "abortaj" rimoj

Gekolegoj-poetoj,
Post meditoj abortaj
Premas min per konkludoj
Miaj rimoj senbridaj
Kun pretendoj kompletaj
Pri kutimoj kaj ordoj
Por mi plej absolutaj,
Ekster mokoj kaj ridoj.

Viaj lastaj vekrioj
Pri abol' de l' abortoj
Min atingis en lundo.
Mi reagis kompate, –
Ja, mi scias pri tiuj
Mutacioj envortaj.
Sed mi vivas en lando,
Preferanta al glate

Asfaltitaj ŝoseoj
Stepojn, ankaŭ arbarojn,
Vivon, eble sen sato,
Sed en plena libero.
Do, la plendoj plenveaj
Pri nur puraj rimparoj
Iras kontraŭ la stato
De l' realo afera.

Do, min gvidas sincer' kaj
Mia kripla eduko,
Al uzado konstanta,
Malgraŭ ĉiuj oponoj,
De l' rimparoj, eĉ sterkaj
Por verkad' kaj traduko,
Kiujn mi, diletanto,
Trovas saĝaj kaj bonaj.

Kvankam kontraŭ abortoj
L' geniul' Kalocsay
Pledis kune kun Papo
Por la versa belsono,
Mi plu pensas, ke vortojn
Prirabotu mi, ĉar
Estas mia eskapo.
Kisas vin, Bruna Ŝtono.

REKLAMACIO

Estimata redaktoro!

Mi dankas vin por la gratulaj vortoj okaze de la premiigo de miaj verkoj en la konkurso "Premio Napolo 2002" kaj la senpeka publikigo de mia versaĵo "Santa Luĉia". Sed mi tre bedaŭras, ke mi konsentis publikigi en via revuo la rakonton "Ho, dolĉa Napoli", ĉar vi tro libere manipulis per la aŭtora teksto de la rakonto, eĉ ne avertinte pri tio la aŭtoron. Se ĝi ne estus premiita, plej verŝajne mi limigus min per rideto en pugnon pro ies "redaktora juko" kaj, eble, dirus buŝe mian nekonsenton, kiel mi tion faris pri via korekto de "legendara" je "legenda" ("legenda longo", "legenda enhavo", eĉ "legenda heroo" de certa legendo; tamen "legendara heroo" = famiĝinta tra multaj legendoj). Sed en la situacio, en kiu vi min metis, mi ne estas certa, ke la ĵurio de la "Premio Napolo 2002" aljuĝus al mi ian premion, se la rakonto aperus antaŭ ĝi kun viaj "korektoj". Tial mi petas vin publikigi en via revuo tiun ĉi mian leteron.

Komence mi intencis peti vin publikigi la restarigon de miaj originalaj teksteroj kun klarigoj, pro kio mi preferis miajn, sed ne viajn variantojn. Sed ĉar da tiaj lokoj okazis pli ol du dekoj, la tuta korektita teksto okupus pli da loko ol la rakonto mem… Tial mi nur en kelkaj vortoj notos viajn misojn.

Antaŭ ĉio, mi petas vin pli atente studi la Fundamenton de Esperanto por almenaŭ scii distingi inter tiaj vortoj, kiaj "luma" kaj "hela". Pro justeco mi devas diri, ke en tiaj eraroj kulpas la tradicia instruado ĉe ni de tiuj vortoj. Min siatempe oni ankaŭ instruis, ke "hela" signifas "светлый", dum en la Fundamento, en ĉiuj kvin lingvoj, la vorto estas tradukita "яркий", kion konfirmas ankaŭ la frazo 13 de la §10 de l' Ekzercaro.

Notu ankaŭ la punkton 3. de la konkludaj vortoj en la Antaŭparolo.

Due, ritmon havas ne nur poezio, sed ankaŭ prozo. Kaj aldono de unu sola silabo aŭ elĵeto de unu sola haltostreko povas rompi la tutan ritmon, do senvalorigi ĝin en la funkcio de impreso al leganto.

Trie, vortoj, krom preciza senco, havas stilan koloron. Do ŝanĝo de unu vorto per alia samsignifa, sed alistila ankaŭ disharmoniigas verkon.

Kvare, en la beletro ekzistas tia fenomeno, kia onomatopeo. Ŝajne vi ĝin ne komprenas, ĉar facilanime simple ĝin elĵetis el la teksto. Tial mi klarigas per ekzemplo:

Mi skribis: "Malgraŭ ĉio ĉi ia trankviliga aŭro aerumis de la golfo". Vi faris "bagatelon": nur elĵetis "ĉi"! Kaj – la aŭdebla susuro de la pluvo malaperis. Pro la triviala "malgraŭ ĉio" la tuta poetika agordo plonĝis en la grizan banalon…

Kaj fine: Se verkistoj ne eksperimentus, nia lingvo ne estus evoluinta tiel pompe, kia ni vidas ĝin nun. Do, tio, kio, sub la influo de via gepatra lingvo, ŝajnas al vi kontraŭgramatika, en Esperanto povas esti ĝuste verkista eksperimento, nature elfluanta el la internacia medio de ĝia funkciado, kiu puŝus nian lingvon al plia disfloro. Do, korektante senkonsidere ŝajnajn gramatikajn erarojn, vi bremsas la evoluon de nia lingvo al plua disfloro. Tial, antaŭ ol ion korekti, vi devus konsulti aŭtoron.

V.Zlotnikova (Moskvo)

La supra teksto aperas sen ŝanĝoj, ĝuste tiel, kiel ĝin skribis la aŭtoro. Malgraŭ la argumentoj de Vera Petrovna ni daŭre opinias, ke la sencon de la vorto "luma" plej adekvate transdonas la traduko "световой" aŭ "светящийся", kaj en la Fundamento estas pluraj vortoj, intertempe arkaikiĝintaj. La ellaso de "ĉi" okazis pro mistajpo dum la enkomputiligo de la manskribita rakonto. Pri tio ni pardonpetas. Pri aliaj akuzoj ni nenion povas respondi, ĉar ili estas abstraktaj, sen konkretaj ekzemploj, por kiuj ni povus aŭ argumenti la pravecon de la redaktaj korektoj aŭ konfesi pri ties nepraveco. (G.Kokolija, V.Aroloviĉ)

Observante certajn diskutojn, okazantajn dum lasta tempo inter esperantistoj, precipe en la retaj diskutlistoj, multaj opinias, ke tiuj kvereloj serioze malhelpas la evoluon de E-movado. Sed ŝajnas, ke tiaj "diskutoj" kaj "aktivuloj" estis ĉiam kaj neniam serioze influis (pozitive aŭ negative) la movadon. Pri tio atestas ekzemple la suba versaĵo, verkita en la unua duono de la pasinta jarcento.

LA MISVOJO

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkas eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.


Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
"Laboru kaj fidu!" la homoj nin petas,
"Neniam!" en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante – neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkintajn foliojn disĵetas,
Ni helpas la venton, kaj, refortigitaj,
Ni plenan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tedas per malpropagando
La homojn tra tuta la lando.

Fernando Redondo Ituarte (1882 – 1949)

CERBE KAJ KORE

preparis Valentin Melnikov kaj Oĉjo Dadaev



La 8-a de marto jam pasis, tamen REGo aperas nur ses-foje jare, do marto apartenas al tiu ĉi numero. Tial la nuna literatura rubriko estas dediĉita al niaj virinoj – kiuj inspiras nin al poemverkado kaj verkas mem, al niaj verdaj muzoj...

Oĉjo Dadaev (Moskvo)

TRIPTIKO PRI MUZO

***

Hodiaŭ muz' ne venos,
Hodiaŭ l' muzo lacas.
Kaj la paper' malplenos,
Al blank' kapitulacas.
Skribilo sen laboro
Sur tabl' ripozon ĝuas,
Kaj teksto sen aŭtoro
En la aer' enuas.
Kaj mi silente sidas,
Rigardas al papero.
La pensoj ne rapidas
En tiu ĉi vespero.
Jam baldaŭ ekmatenos.
Atendi jam agacas.
Hodiaŭ muz' ne venos.
Hodiaŭ l' muzo lacas.

06.10.1999

***

Silentas mia muzo. En angulo
Sur ligna tabureto sidas ŝi.
Kaj la vizi' de mia poezi'
Ĉepordas kun bastono de vagulo.

Surstrate regas ventoj de aŭtuno,
Foliojn pelas lude dis kaj for.
Mi iĝas elemento de l' dekor'
En tiu mondo de malvarma suno.

Jam araneoj sian reton plektas
Sur tiuj manoj, kiuj kreis vin.
Vi estas la real' kaj halucin'.
Perfektas vi, sed min, ho ve, neglektas.

Ĉepordas kun bastono la vagulo.
En la animo lumas malproksim'.
En la profundo senesprimas rim':
Silentas mia muzo en angulo.

02.11.2002

***

Mia muzo vestiĝis varme,
Dorsosakon surmetis grandan,
Min rigardis angore-senlarme
Kaj ekiris la vojon rubandan.

Ŝi foriris serĉi inspiron,
Bildojn helajn kaj emociojn.
Mi atendis tiun foriron,
Ŝi delonge meritis feriojn.

Ŝi foriris kaj mi restis.
Inter kvaro da premaj muroj.
Inter svarmo da orfaj rimoj.
Inter milo da ŝiaj spuroj.

Prenis mi forgesitan liron,
Kaj la kordoj interne resonis.
Mi foriras serĉi inspiron,
Mi delonge tion bezonis.

25-26.12.2002



Hilda Dresen (Estonio)

1896-1981

FRU-AŬTUNO

(1927. La unua originala poemo de H.D.)

Orfoliojn mi deziras,
tedis al mi fruaŭtun',
je aceroj mi sopiras,
flagretantaj en la sun'.
Kaj mi miras, kaj mi miras,
ke foliojn vent' ne ŝiras.

La ĉielo grize bluas,
verdas, sed ne floras ter',
horoj nun senfine fluas
kaj embuskas senesper'.
Mi enuas, mi enuas,
kial arbojn vent' ne skuas?

Sed, se la natur' purpuros
kaj ekflavos kvazaŭ or',
se la foliar' maturos
por aŭtuna mortohor',
duonfluge mi ekkuros,
la folioj eksusuros.

BETULO

Malmulton bezonas okulo
Por esti ravita:
Jen tegis sin nuda betulo
Per verdo subita.

Ho, kia belec' senmezura:
Betul' beltalia
Sur fon' de l' ĉielo lazura
En rob' freŝfolia.

Sur blanka trunketo diskreta
Vual' bonodora...
Ekvibras en koro sekreta
Sopiro dolora.

Eli Urbanová (Ĉeĥio)

TUKO

Tian mi aĉetis tukon:
verda estis ĝi kaj lila
kaj ol plumo pli facila,
nu, bela!

Mi ĝin ligis sub mentonon,
mi ornamis per ĝi nukon –
Kiu havis tian tukon?
Neniu!

Kaj li vidis mian ĝojon
kaj trioblan ĝojon sentis.
Se mi lin kun tuk' turmentis,
do dolĉe!

Mi la verdan tukon metis
nome sub la umbilikon –
Nuda timus mi kritikon,
konfesu!

Estis tuk' venene verda,
bela, lila en anguloj.
Al li sole la okuloj
ekbrilis –

Tie ĉi indiĝenino
nur en tuko sin apogis.
Jes, ĉi tie mi delogis
lin tiam!

Ĉion, ĉion mi memoras:
Kiel manojn li etendis –
Kiel verda tuko pendis
sur seĝo –

Ke li poste, jam trankvila,
al mi tiun tukon laŭdis –
Ke mi lin eĉ ronki aŭdis
volonte –

Verda tuko apartenas
al trezoro de mi, riĉa.
Foje estis mi feliĉa,
amata –

Lina Gabrielli (Italio)

MI REVAS BLANKAJN STRATETOJN

Mi revas blankajn
stratetojn;
mallarĝajn,
kaŝitajn
stratetojn
inter la altaj muroj
de la domoj,
kie oni povas
facile brakumi
kaj kisi arde,
libere.

MI FROSTAS

Mi frostas,
tremas.
Serĉu min,
mi petas!
Mi lasos min
trovi.

Ludmila Jevsejeva (Latvio)
1913-1980

COLLONGA AMO

Aŭtuna vent' en mia leterkesto
tilifolion sekiĝintan lasis.
De vi letero plu ne venos. Pasis
hazarda epizod' somera, stulta dram'.
Collonga estis am'.

NAIVA MUSO

Subtegmentejon iris mus'
Tre juna, sen la sperto.
Surloke renkontiĝis ĝi,
Imagu, kun vesperto.

Ektremis surprizita mus'
Kaj, reveninte kelon,
Ravita, flustras al patrin':
"Mi vidis ĵus anĝelon!"

Marjorie Boulton (Britio)

***

Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
De l' dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume en koro, primitiva dramo
Okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
Sub nigra robo brulas nun pro amo
Virino simpla en dezir' tortura.

La lektorino pensas. La virino
Baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet’ per arta disciplino
Observas ilin ambaŭ kaj komentas.

Lucija Borčić (Kroatio)

MEMORBRIZOJ

Dum la vintraj longaj frostoj
nin varmigas la memoroj,
ni postspuras memorfostojn
de l’ belaĵoj el la foro.
En la koro reas sparko
de l’ junaĝa sopirardo.

Dum someraj tagsufokoj
nin freŝigas eksa brizo
de l’ memoroj ĝu-elvokaj
kaj nin helpas for el krizo
de l’ alvena olda aĝo
per bonven’ kaj sen damaĝo!

EL KIE TEMOJ POR POEMOJ

El kie venas temoj
por poemoj?
El simpla demando
kaj ĝia respondo.
El nura ekrigardo,
el pura hazardo,
ĉe l’ ekpenso
pri senc’ aŭ sensenco,
ĉe l’ travivita ĝuo,
eĉ dum vakuo.
El pura ekdeziro
kaj el ekmiro.
El pretera vido,
dum timid’ aŭ senbrido,
preterorela aŭdo,
plenkora aplaŭdo,
naztikla odoro,
plenumita laboro,
ĉe l’ ĝoja renkonto,
eĉ post desaponto,
ĉe l’ plentrafo,
ĉe ĉiu mispafo,

eĉ post fiasko
jen poemnasko.
Ne ekzistas limoj
por kreo de l' rimoj.
Mem aperas la temo
post ĉiu ek-emo.
El ĉiu semo
ekĝermas poemo.

Lidia Ligęza (Pollando)

ĈU MI ESTAS MI?

Ĉu mi estas mi
demandas infanoj kaj filozofoj

la patro en mi
koleras kaj akre prijuĝas aferojn
la patrino en mi
atendas kataklismon
ĝeneralan
aŭ almenaŭ median

okuloj de avino
rigardas min de la spegulo
avinjo dua ŝatis literaturon
onjo rimarkis avantaĝojn
de la internacia lingvo esperanto
avo amis naturon kaj vivon

mi estas mi nur iome
la resto apartenas al familio
do al la homaro

SOLECO

Mi ne ŝatas soleci
soleco estas kiel pano kaj akvo
necesa

permesas pensi verki ripozi

mi revenas al ĝi
kiel al iu la plej kara
sed nur tiam
kiam mi scias sendube
ke dum ĉia momento

mi povus iri kinejon
viziti amikinon
vin ekvidi

alie
soleco estas kiel ilo de l' malbona sorto
turmenta
kaj dum tia soleco
anstataŭ pensi verki ripozi
malpaciencas en mi
mia eno – estaĵo perversa

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

EN LA TARDA VESPERO...

En la tarda vespero
la aŭtuna vetero
sen kviet' kaj espero
serĉas lumon tra l' ombroinvad'.
Ion petas la vento
per la brua lamento.
Ĉu averto aŭ pento
sonas home en ĝia hurlad'?

La veter' ne angoras.
En la vento sonoras
kaj kaŝite furoras
la bongusta matena arom'.
Sonas kanto la brua
pri maten' vigle blua
kaj en hor' la malfrua
laŭte vokas trankvilon al hom'.

MIA PREĜO

Estu bona la nova tago,
Kiel kara unika donac',
Sen teruro de ies plago,
Sen malsan', malsat' kaj malpac'.

Ne ĉagrenu ofenda vorto.
Ne naskiĝu malnobla inklin',
Kaj la voĉo de l' bona sorto –
Esperanto – ne lasu min.

REVENO DE LA VINTRO

Fine de l' marto neatendite
Tondris la frosto kun la kolera
Vento malvarma, kvazaŭ subite
Vintro revenis la fridvetera.

Kion ĝi volas de la ekvarmo?
Aŭ ĝi pri io tarde forgesis?
Ĉu per la frostobatoj ĝis larmo
Penas ĝi diri: "Plagoj ne ĉesis!"?

Iu hazarda, neatendinda
Ludo de l' ŝanĝiĝema naturo.
Nekomprenata, fola aŭ blinda,
Scias ĝi ludi sen vivmezuro.

Neĝas kaj neĝas. Morne tutblankaj
Splenas tegmentoj, arboj kaj tero.
Je la ondigoj deĉiuflankaj
Kuras la hirta neĝorivero.

Ree l' glacio emas perfidi
Kaj senkompate skuas la vento.
Hurlo de l' vintro. Helpu ĝin bridi
Ondoj de gaja varmotorento!

Natalja Iljina (Moskvo)

***

Voku min dum malfrua horo,
Se en koro regas angoro,
Ĉion diru, kaj mi komprenos,
Kio vin tiel nigre ĉagrenas.
Ĉar malmulton oni bezonas:
Aŭdi, kiel konsolo sonas.
Ĉar dum nokta sendorma horo
Venas prema amar' al koro.
Voku min, se petos animo,
Mian dormon rompu sen timo,
Ĉar tre bone mi mem komprenas,
Kiel koron soleco ĝenas.

ENIGMOJ. *La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>) aŭ poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71).*

1. ERUDICI-LOTO + ANAGRAMO

1. La SAT-Kongreso en 2003 okazos en: a) Chaux-de-Fonds; b) Geneve; c) Zurich; ĉ) Neuchatel.
2. La nuna redaktoro de la revuo "Esperanto" estas: k) Istvan Ertl; l) Stano Marcek; m) Stefan Maul; n) Miyamoto Masao.
3. UEA eldonis en 2001 la libron de: s) Homero; ŝ) Macchiavelli; t) Marko Polo; u) Konfuceo.
4. Ekde 2002 ĉesis aperi en papera formo: j) El Popola Ĉinio; ĵ) La Gazeto; k) Eventoj; l) Literatura Foiro.
5. En julio 2002 festis sian 50-jaran jubileon E-centro en: c) Bouresse; ĉ) Poprad; d) Bydgoszcz; e) Gresillon.
6. Ekde 2002 ekzistas E-katedro en: ŝ) Tatario; t) Karelio; u) Dagestano; ŭ) Kaliningrado.
7. La projekton "Indiĝenaj Dialogoj" gvidas: a) Bessie Schadee; b) Eva Bondar; c) Sabira Stalberg; ĉ) Ilona Koutny.

Se vi ĝuste elektos respondojn al la demandoj, do el literoj, markantaj tiujn respondojn, povos rezultiĝi anagramo de iu vorto.

2.

El du vortoj forstreku ses literojn por ricevi la nomon kaj familnomon de fama E-aganto: SIVEOS LALIPETERNONJAN

3.

El unu vorto ricevu du geografiajn nomojn: SKANDINATOLIPARO

4. ELIMINADO

Oni devas trovi kvar sesliterajn radikojn; en la respektivaj listoj ĉiu radikalo havas tiom da komunaj literoj kun la serĉata, kiom indikas la apuda cifero:

a) balkon (2), pistol (4), terpom (3), pardon (3);
b) kartoĉ (2), matros (3), profit (4), signal (2);
c) kastor (1), replik (4), korund (2), kazuar (3);
ĉ) gratul (1), plafon (2), mispaŝ (3), viburn (2).

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

REJM: str.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

OkSEJT

Inter la 4-a kaj 12-a de aŭgusto 2003 apud Kostroma okazos instru-tendaro **OkSEJT (Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro).** Ĝi estos jam la 43-a OkSEJT. La aranĝo okazos en tendaro apud rivero, estos nur tenda, aliaj loĝeblecoj forestos. La programo konsistos el kurso de Esperanto por startuloj kaj komencantoj, okazos multaj paroligaj programeroj, estos prelegoj pri E-movado, ne mankos gajaj ludoj kaj konkursoj.

OkSEJT ĉi-foje ne estos amuza aranĝo. Plej ĉefe ĝi estos instrua kaj paroliga tendaro. Pro tio la organiza komitato bonvenigas nur jenajn kategoriojn de partoprenantoj (kun prezoj por la tuta periodo, kun trifoja lignofajra manĝado kaj la programo): 1) Lernantoj - po 500 rubloj (ĉ. 15 eŭroj); 2) Organizantoj - po 250 rubloj (ĉ. 7.5 eŭroj); 3) Instruistoj - po 0 rubloj/eŭroj); 4) Eksterlandanoj - po 10 eŭroj (se ne estas instruistoj aŭ lernontaj komencantoj). La kvanto de partoprenantoj (ĉefe lernantoj) estos limigita; partopreni en la aranĝo eblos nur plenperiode.



Lernantoj: temas pri startuloj kaj komencantoj (ĉiuj fluparolantoj - bonvenon al RET). Ne nur rusparolantoj estas bonvenaj, sed ankaŭ eksterrusianoj. Organizantoj: vi ankoraŭ povas trafi en tiun kategorion, se vi proponos interesajn programerojn kaj pretas mastrumi en la tendaro (tendoj, lignofajro, preparo de manĝoj). Instruistoj devos ne nur veni, sed ankaŭ ja instrui; esperantista turismado ne vere eblos dum OkSEJT: ĉiuj en la tendaro devas ne nur ripozi, sed ankaŭ labori - labori pri plibonigo de la lingvoposedo ĉe la komencantoj. Eksterlandanoj estas iom specifa grupo, temas fakte pri ekster-ruslingv-anoj; ni speciale bonvenigas tiajn homojn por krei "lingvan fonon", "Esperantan etoson" kaj por montri la bezonon de bona studado al la venontaj komencantoj (ne gravas aĝo, interesoj, karaktero - gravas bona Esperanto kaj nescio de la rusa).

Se vi interesiĝas pri OkSEJT-43 (kaj ĝi ja ŝajnas esti io sufiĉe ekzotika por decidi pri la partopreno jese), kontaktu la organizantojn poŝte per la adreso de REJM, rete per <rejm@tejo.org> aŭ per formeto en la paĝo <http://tejo.org/rejm/oksejt/>. Ĝis la revido en tendaro!

la Organiza Komitato

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 2 (15) aprilo 2003***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ

poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2003:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 120 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*